

Bô Yin Râ

LA LIBRO DE LA REĜA ARTO

Definitiva eldono
surbaze de la nefinitaj eldonoj de 1913 ĝis 1920

El la Germana originalo
(„Das Buch der königlichen Kunst“)
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

Kopirajto ĉe
Kober'sche Verlagsbuchhandlung
Bazelo 1932

Estas malsaĝe kredi, ke la atesto de la plej alta sperto de la homoj plej spertaj de iu raso estas trovebla *en la literaturo* de popolo de tiu raso.

Estas eĉ pli malsaĝe supozi senhezite, ke oni bezonas nur traduki precize ĉiujn tekstojn de tiu literaturo por savi la lumerojn, troviĝantajn en ĝi, por la propra raso aŭ popolo.

Certe: tiom longe, kiom la tero rondiras ĉirkaŭ la suno, la leviĝo de la lumo venis al ĉio tera *el Oriento*, kaj ekde la komenciĝo de homaj provoj trovi sin mem, la plej spertaj trovintoj estis *en Oriento*.

Sed nur nedireble malmultaj eroj de iliaj trovoj eniĝis en la verkaron de la popoloj de ilia raso. –

Sekreta restis – eĉ por la „sanktaj skriboj“ – tio, kio ĉiutempe restos sekreto por ĉiu, kiu ne mem *spertis ĝin en si!*

Tiu ĉi libro instruu al la leganto akiri tiun *sperton* en la maniero konforma al li aŭ ŝi.

La instruoj tie ĉi donitaj baziĝas en la rokofundoj de la eterna realo.

Sed la celo de tiuj ĉi instruoj ne kuŝas nur en ili mem, kaj ili celas ne krei „dogmojn“, sed doni nur necesan eksplikon.

Nur kiam ili kondukis al *interna sperto*, la serĉanto vere alproprigis ilin al si.

Parto I

LA LUMO DE HIMAVAT KAJ LA VORTOJ DE LA MAJSTROJ

SE VI SERĈAS LA LUMON, VI SCIU,
KE VIA VOJO ESTAS GARDATA
DE LA LUMANTOJ
EN LA ETERNA TAGO!

La lumanto al la serĉanto

Mi volas paroli al vi pri la vojo, kiun mi mem iris.
Mi volas montri al vi la vojon, kiu mi mem *fariĝis*.

Mi estis tiom proksimiĝinta al la suno, ke ĝi kovris
la tutan ĉielon.

Ĉio estis en flamoj, super kaj sub mi.

Mi estis *migranto* sur la vojo en la lumon, kaj ne-
atendite, senalternative, mi estis fariĝinta *vojo* ...

Fariĝinte vojo, mi pafiĝis en la celon kiel sago: –
forbruligis min mem en la ardanta suno.

Tiel mi mem fariĝis ardo kaj lumado.

Min mem mi konsumas en mia fajra lumo: – kiel mi povus voli ion alian, ol ke ĉio fariĝu lumo kaj fajro!

Ĉiuj sunoj brulas en la sama lumo.

Kiu forbrulis fariĝante suno, estas unuigita kun *ĉiuj* sunoj.

Vi ne scias, *kiuj* sunoj lumas al vi per mia lumo.

Ne tiru limojn arbitre!

En la lumo *malaperas* ĉiuj arbitraj limoj. –

Serĉu la *lumon* en la *sunoj* kaj la sunojn en ilia *lumo!*

Amu iomete la *lumon* en ĉio lumanta, – ho serĉanto!

Se vi volas *proksimiĝi* al la lumo, ĉesigu vian rezistadon!

Ĉio en vi ankoraŭ estas *rezisto*.

Ĉio en vi ankoraŭ estas *parolado*: – tial vi ne *aŭdas*...

Ĉio en vi ankoraŭ estas *rigardado*: – tial vi ne povas *vidi*...

Ordonu silenton al vi mem kaj tenu viajn rigardojn koncentritaj, por ke *la kvieto* eniru en vin!

Nur en sensona *kvieto* vi povas percepti la eternan vorton. –

Sed ankoraŭ mil rezistoj estas en vi, kiuj batalas kontraŭ alia milo.

Vi ankoraŭ ne estas libera en vi mem.

Vi ankoraŭ ne estas sendezire preta iri kun mi la padon al la lumo.

La “*komenco*”: – la *Praesto*, – generas el si la *Pralumon*, kaj la *Pralumo* generas la *Vorton*.

Sed la Vorto havas la *lumon de vivo*, kaj la lumo *lumas* en la Vorto, kiu generas la “*Patron*”: – la praan spiritan *homon*, – en la profunda kvieto de la eterneco, kiu hodiaŭ estas, kiel ĝi ĉiutempe estis, kaj ĉiam estos.

Kion ni sciigas al vi el la *vorto*, tio ne estis elpensata de homaj cerboj ...

Ĝi estas sciigo de la *eterneco* kaj havas nenion komunan kun *elpensita* tera saĝo.

Kion vi tie ĉi ricevas, tio estas lumo el la vorto.

En la vorto ni ĉiuj, al kiuj vi ŝuldas tiujn ĉi vortojn, estas *unuigitaj en ekkonado kaj konscio*.

Ni kreas laŭspiritan *ordon* per la *vorto*: – en la kaoso de la spegulaj bildoj, kiuj reciproke sin premas kaj forpremas sur la supraĵo de fortoondoj konstante movataj kaj strebantaj en la plejeksteron.

Kiam ni *instruas*, ni instruas ekkoni *nin mem*.

Nur per vivo *vivata konforme* al la instruo oni povas meti antaŭ viaj okuloj *vivantan lumon*, sen blindigi vin per ties prabrilo.

Se vi volas atingi la lumon, vi devas lerni *fidi*.

Fidi signifas: disvolvi *forton* por *veki pli altan* forton.

Vortoj de fido solaj *povas* disvolvi forton, sed vi lernu fidi ne *sole* per vortoj.

Fido estas volo!

Laŭ via *fido*, okazos al vi, kiel vi *volas*.

Kia via fido, tia via forto!

Nur via *propra* forto malligas por vi ĉiun *pli altan* forton helpantan.

Se vi volas atingi la lumon, lernu *preĝi!*

Kiam vi preĝas, petu antaŭ ĉio pri *flugiloj!*

Vidu: ekzistas flugiloj, kiuj portas *pli alten* ol tiuj de aglo...

Ekzistas flugiloj, kiuj vin portas super ĉiuj steloj.

Petu pri *tiaj* flugiloj, se vi volas preĝi.

Ĉiu alia preĝo fariĝas blafemo, se vi ne samtempe petas pri tiuj flugiloj. — —

Kiu *petas* pri flugiloj, al tiu flugiloj vere estos *dona-taj*...

Dum vi *volas* flugi, *kreskos* al vi flugiloj.

Jam dum vi preĝas, vi estos levita.

Kaj nun, vi serĉanto, detruu la *falsajn* diojn, se vi volas proksimiĝi al *Tiu ununura, eterna*: — al via *vanta* Dio.

Via Dio estas *en vi mem*, kaj *nur en vi mem* vi povas ekkoni lin.

Nur *en vi mem* li povas naski sin al vi...

Nur *en vi mem* li povas fari sin perceptebla al vi.

Vi ne serĉu iun “dion” *krom* la Dio en vi!

Vi ne volu *servi* al iu *alia* “dio”!

Aŭdu la antikvajn, erare interpretitajn vortojn!

Aŭdu ilin nove komprenante!

Aŭdu kun tremanta koro: –

“MI” – “estas la Eternulo!” – diras via Dio ...

“Vi ne serĉu *aliajn* diojn!”

“Vi ne formu al vi *imagon*, por *krei* al vi mem ‘dion’, kiu, kiel monstra distordita bildo de vi mem, estus en ekzisto kondiĉata *nur de vi*, ĝis vi mem malaperas el la surtera vivo! – –“

Tie ĉi, ho serĉanto, vi staras antaŭ la komenco kaj neniam finiĝanta fino de ĉiu vero!

Bone estas al vi, se vi ekkonas, kion la vortoj de tiu, al kiu lia Dio tiele parolis, havas por diri al vi. –

Intence mi tie ĉi donis al vi la *sencon* de tiuj vortoj, originintan el la eterneco.

La rikolto

Ni ĵetu kovranton vualon sur ĉiujn parolojn, kiuj estis rigardataj diversmaniere kiel niaj diroj dum la lastaj generacioj.

Tio certe estos pli bona, ĉar bezonas delikatan traktadon multo, kiun ni alie devus senindulge sarki, se ni volus, en ĉiu instruo, liberigi de ĉiu trudherbo tion, kion ni sciis semi.

Niaj spirite “pli junaj” homaj fratoj kaj fratinoj kalkulas laŭ multe pli *mallongaj* tempoj ol ni.

Tial kelkaj el ili sentis sin vokitaj, trude helpi en la agado surmetita al ni.

Kiom malplaĉus al tiuj “impetuloj sen malbona intenco” la rapido de nia agado, se ili sciis, ke ni hodiaŭ estas nur *je la komenco* de tiu agado, vidante apenaŭ ekigita tion, kio ŝajnas al ili jam antaŭ longe finita.

Ni disŝutas semon sur plugitan grundon.

Dependas de *vi*, ĉu la semo povas *ĝermi*. –

Zorgu, ke frandemaj birdoj ne manĝu la grajnoj, antaŭ ol povas formiĝi radikoj kaj tigoj!

Gardu tion, kion oni konfidas al *vi*!

Multaj devas sidi *en mallumo* kaj multaj devas loĝi *en ombro*, ĉar la tagoj estas *tenebraj*: – ili manĝas la lumon.

Sed al tiuj, kiuj *maldormas* ankaŭ *nokte*, leviĝos la suno je la meznokta ĉielo.

Al tiuj venos laborantoj en la rikolton por ligi la garbojn de greno.

Poste venos blanke vestitaj paŝtistoj kaj kolektos siajn gregojn per flutludado.

Tiam ĉiu homo serĉanta gvidadon trovos la gvidanton.

La gvidanto gvidos lin, tra la feraj pordegoj kaj la dezerta vojo, al la altaĵoj de Himavat.

Tie la suno dronis en *lumo* kaj la tero perdis sian graviton.

Tie la ĉielo estas eterna fajra brulo kaj ĉiuj steloj ardas hele en ĝia lumo.

Ĉio, kio estas matura por bruli, tie fariĝas *fajro* kaj eterna *lumado*...

Sed multe estas ankoraŭ verda kaj plena de akvo.

Sekve ĝi *rezistas* al la brulo, – *kreskas*, *velkas* kaj *forputras*. – –

Senerare la eternaj patroj ekvidas la nutron por la lumfajro.

Ili ekbruligas stelon post stelo en la lumanta ardo...

Aŭdu: – *ekbruli*, *ardi*, *lumi*, aŭ: – *forputri*, – *unu* el tiuj du estas via sorto!

Se vi provas eskapi el tio, via propra malsaĝo trompas vin.

Vi havas nur *la elekton*.

Kiu aŭdacas rigardi sian propran opinion kiel egalan al *eterna dia saĝo*, tiu malhelpas la surteran agadon surmetitan al ni.

Li blasfemas la *lumon*, kiu tralumas la teron, kaj pekas kontraŭ la *spirito*, el kiu li mem vivas.

Ve al la homo, kiu krime tiel metas siajn *pensojn* en la lokon de la *vorto*!

Antaŭ ol fariĝis la mondoj, estis la vorto kaj en ĝi la *lumo* de *ekkonado* de l' vorto.

Ne en *pensado* tiu ĉi ekkonado fariĝas spertebla al la homo, ĉar la pensado estas nur la *servanto* de la vorto.

Kiu ajn volas ricevi la lumantan donon de la *mastro*, tiu ordonu al la servanto *silenton*.

Ni plenumas la taskon de la plej interna Oriento: – la agadon de la luma tago de la eterneco.

Ni devas malfermi la animojn *al la vivanta lumo*.

Kiu serĉas gvidadon kondukantan neniun sur malĝustan vojon, tiu konservu siajn vortojn en sia koro!

Ni estos proksimaj al li, eĉ se li vivas sur la alia flanko de la tero.

Ni estas naskitaj en la surteran vivon kiel senditoj de la filoj de l' Pralumo: – la patroj de la *lumo en la vorto* ...

De antaŭ jarmiloj ĉiam denove, pere de ni la lumo en la *vorto* fariĝis *laŭhome ekkonebla* al la homoj, sen blindigi iliajn okulojn.

Estante en la karno, ni vivas la vivon de la eterneco.

Kiu estas gvidata de ni sur la malvastan padon kondukantan al nia regno en la spirito, tiu iras renkonte al sia propra *esto* en la eterno.

Ni gvidas al la steloj de eterna vivo, kiuj estas *unu* kun ni – *naskitaj* el *esenca* lumo, *vivantaj* en la lumo, kiu ekde la prakomenco *estis*, ĉiutempe *estas* kaj *neniam* povas *estingiĝi*.

Ni estas *tre malmultaj*, kiuj *korpe reprezentas* surtere tiun praaĝan *unuecon* de volo.

Sed *multaj* ni estas *kun tiuj*, kiuj portis tiun ŝarĝon *antaŭ* ni, – kun tiuj, kiuj portos ĝin *post* ni.

Nek per popolo kaj nacio, nek per nacia lingvo, nek per spaca aŭ tempa distanco ni estas apartigitaj, aŭ iam apartigeblaj, kvankam en ĉiu el ni konserviĝas la teraj ecoj de lia raso.

En ni mem ni adoras tion, kio volas revelacii sin *per* ni...

Ni *rezignis* pri la deziro esti io alia ol *Lia* revelacio en la mondo de videbleco.

Ni estas *absoluta unueco* en ni mem, kaj nia tera malkomponiĝema korpo estas al ni nur *instrumento* en la mondo de estiĝado kaj forpasado.

Neniu el ni havis ian *deziron* fariĝi tio, kio ni nesciante *estis*, kaj nun konscie *estas*.

Antaŭ pratempoj ni estis elektataj de tiuj solaj, kiuj elekti *povas*, kaj ni prenis la devon de elektito sur nin kiel pezan, sanktan *ŝarĝon*.

Ĉiu el ni rememoras kun terurego la tagon, kiu alportis al li la teran scion pri la devoj kaj respondecoj, kiuj estis surmetitaj sur lin en la spirito jam antaŭ jarmiloj...

Kie ajn vivas unu el ni, tie estas unu el niaj spiritaj temploj.

Neniu el ni donas instruon bazitan *sole* sur subjektiva ekkonado.

En la vorto de la *instruanto* parolas ĉiuj agantaj fratoj el la eterna Pralumo *en unuigo*.

Vane oni provus *apartig* unu el ni disde liaj fratoj unuigitaj kun la spirito.

Nek oni povas malligi iun el ni disde la aliaj per la morto, ĉar ni ĉiuj vivas *unu en la alia, interpenetrante*, – indiferente, ĉu ni ankoraŭ estas en la tera korpo, aŭ ĉu ni jam forlasis ĝin.

Ni superpaŝis pensadon kaj rigardadon kaj trovis la regnon de la plej simplaj signoj: – la landon de la *realo*.

Tie ni vivas, kaj de tie ni agas, unuigitaj en la plej-interno, eĉ se miloj da mejloj devus esti venkataj, se ni volus renkontiĝi en niaj teraj korpoj.

Kiu spirite trovis aliron al *unu* el nia rondo, tiu eniris en *templon de la spirito* sur tiu ĉi tero...

Ni volas atingi la *korojn* de la homoj, por ke la koroj trovu la padon al la *spirito*, kiu restas *netrovebla* al ĉiu pensado de la cerebroj tiom longe, kiom *tio spirita* de la homo ne sukcesis trovi ĝin.

La elekton gvidas *leĝo origininta el la spirito*, leĝo nek malobeebla, nek rompebla.

Neniu el ni estas libera spirite unuigi kun si ĉiun kiu venas.

Rivero devas esti proksima al la maro, se ĝi estu kapabla porti marŝipojn. – Tiel same la serĉanto devas esti jam preparita por *alpreni* tion, kion ni havas por doni al li.

Certe, ĉiu kiu spirite venas al ni, povas ricevi *helpon* en la maniero adekvata al li, kaj certamaniere ankaŭ *gvidadon*, se helpo estos vere utila al li, kaj se li jam kapablas ekkoni gvidadon, kvankam ĝi direktas nur lian ĉiutagan vivon. –

Sed gvidadon sur la *plej altaj* vojoj ni povas prezenti nur al *tiu*, kiu atingis la *finon* de la pado tra la dezertoj de seka pensado, per sia *propra* forto.

Sole lin la leĝo *destinis* por atingi la plej altajn altaĵojn de spirita ekkonado.

Ĉiu alia nur *falus profunden*, se ni volus spirite gvidi lin sur la altajn padojn, kiuj estas ireblaj nur por tre malmultaj el ĉiuj homoj samtempe vivantaj sur tiu ĉi tero. —

La infinitobla Unu

Estas malproksime de ni, senvualigi antaŭ la avida okulo de la scivolemo la ĉastan saĝon, kies elektitaj sacerdotoj ni estas.

Ni mem konfuzas per spirita influo ĉion, kio de tempo al tempo *sen* aŭ *kontraŭ* nia volo estis perceptata de *nevokitoj*, por ke ĝi ne rezultigu damaĝon al tiuj, kiuj senpripense kaj senelekte serĉas instruon tie, kie la vero ne estas trovebla.

Post ĉiu sciiĝo, kiun nevokito sukcesis ŝtele akiri, ni devas altigi la muron de silento, kiu ĉirkaŭas la sanktejon, ĉar la leĝo de la spirito *postulas* tiun protekton, kaj ni devas *plenumi* la ordonon.

En la antikva kaj nova tempoj oni donis al vi multon, kiu *ne apartenis* al tiuj, kiuj alportis ĝin al vi.

Vekiĝante lernu ekkoni, kiel la leĝo de la spirito scias ĉiam denove neniigi tiajn donojn, por ne lasi tion origine bonan fariĝi nutro por ĝermanta malfeliĉego.

Nur pri tio, kion ni mem donas al la animoj, ni responsas en la spirito, ĉar ĝi estas la agado surmetita al ni.

Ne supozu, ke en la *tera* Oriento – eĉ je la deklivoj de l' Himavat, kie la sanktaj “cignoj” nestas ĉe la bordoj de la plej altaj templolagetoj – vi estas pli proksimaj al la pura, lume vivanta saĝo de la *spirita* “Oriento”, de la *sunleviĝo en la animo*.

Ne ĉio, kio venas el la geografia Oriento, estas sole pro tiu kaŭzo lumo el la lumo de la *spirita* Oriento!

De Oriento blovas ankaŭ la bruletiga vento de seka spekulativa pensado, kaj same la febra spiro de senbrida superstiĉo.

La plej granda *malsaĝo* kaj la plej alta *saĝo* estas troveblaj en la tera Oriento. –

Sed la *lumo* el la plej interna *spirita* Oriento estas *eterna, kosma saĝo*.

Ni povas atingi *ĉiun popolon* kaj *ĉiun individuon* rekte, sen ĉirkaŭvojo.

Dependas sole de tiuj antingitoj, ĉu tio, kion ni havas por doni, estas akceptata, aŭ revenas al ni, kvazaŭ resaltinte de malmola roko...

Serĉu, kaj vi – estos trovataj!

Sed *tiu* serĉado ne devigas vin eĉ nur eliri el la domo. –

Nur *en vi mem vi serĉu*, kaj nur *en via plejinterno* oni scios *trovi* vin.

Ne kredu, ke vantaj mistagotoj, kiuj deziras meti vin en servutecon kaj tial scias atribui al si similan potencon, iam havos tian kapablon!

Ne kredu, ke ni, kiuj *solaj* estas *kapablaj* por tia trovado, povas percepti *alio* ol tio, kio vin movas *en via spirita vivokerno en plej alta anima maniero!*

Ni ne konas scivolemon, kaj spirite vidas en vi nur tion, kio estas *kapabla ricevi lumon*.

Nia tuta agado celas: ekflamigi *lumon* tie, kie ĝi estas *akceptata*.

Gardu tion, kion ni konfidas al vi!

Ĝi estas *lumo el la plej interna Oriento*.

Certe, la lumo, kiu eterne *estas* kaj eterne *estos*, lumas ĉie en la tenebro, sed la songantoj en la mallumo ne ekkonas ĝin.

Vidu: *vi mem* ankoraŭ estas nur *via songo*, – vi, kiu lernu *ekkoni* sin mem kiel *lumon* en la Pravorto! –

Neniam vi reale estis en la mallumo, kiun vi songante *kreas* al vi, ĉar kion ajn vi sentas kiel malluman, ne havas ekziston en la vero.

Vi estis *lumo* ekde la *komenco*, kiu *neniam* povas fariĝi *pasinteco*, ĉar ĝi eterne estas *estanteco*.

En vi mem vi *volu* lumi, por ke vi ekkonu vian abundon da lumo, – kaj vi *vekiĝu* el la songo de la *mallumo*!

Hodiaŭ vi ankoraŭ estas la *sklavo* de l' songo.

Jam morgaŭ vi eble povas vekigi, kaj via tago estos eterna.

Tiam neniu nokto povos plu rabi al vi la abundon da lumo.

Per elekto fare de via propra volo: – per via *fido* al la *nokto*, – vi fariĝis songo de la mallumo. –

Nun vi heligu vian mallumon, en la sama maniero, per la *fido* al la *tago*, por ke fariĝu lumo en vi kaj via songo finiĝu.

Gardu vin kontraŭ viaj songoj, ĉar la spiritoj de la songo estas despotaj kaj tiranecaj!

Facile ili povas teni vin dormanta *pli longe* ol kiom vi devus dormi, kaj tiam vi *fordormas* vian tagon kaj devas *atendi* ĝis alia tago...

Ankoraŭ vi serĉas en songo – en malplena rigida nenio super nuboj – tiun *Unu*, kiu volas sin manifesti nur *en nenombreblaj unuopuloj*.

Vidu, Li loĝas ankaŭ en vi kaj parolas:

“Mi estas en iliaj koroj, sed ili ne aŭdas mian parolon, ĉar mia voĉo estas milda kiel la voko de fora birdo.”

Tial lernu distingi la mondon de la *imago* disde la mondo de la *realo*!

La *imago* devas esti venkata, sed *ne* la *realo* de la mondo, realo kiun eĉ “dio” ne povus vere venki...

Serĉu la *simplecon de infano* en vi, se vi volas lerni ekkoni ion *spiritan*!

Evitu ĉiun *elpensitan* “saĝon”!

Fuĝu de la mondoj, kiujn sole via *pensado* kreas al vi, kaj kiuj kun via lasta cerebra penso disbloviĝas kiel konfuza fantomaro!

Forlasu la mondon de la ŝanĝiĝanta *imago*, mondon, kiu vivas kaj ekzistas *nur en via kapo*!

Tio estas “*la granda abnegacio*”!

Tio estas la komenco de l’ paŝado sur la pado, dum kiu la migranto iom post iom mem ŝanĝiĝas *al vera realo*.

En sankta ordo regas la leĝo de spirita okazado.

Se la *lumo* el la *vorto* atingu la korojn de la homoj, ĝi antaŭe devas montri la koloron de la tero.

Ni estas ne *la lumo*, sed la *lumantoj de la Pralumo*.

En ni la lumo de la eterneco ricevas la koloron de la tero.

Konfidu al la lumanto, kiu fariĝas via spirita gvidanto en vi mem, sed *amu en li sole la lumon*, kiu – fluegante tra li – volas proksimiĝi al vi.

Liberigu vian animon de ĉiu bildo de mortemaj formoj, se vi volas ricevi tra li la *lumon!*

Kio volas influe agi en vi, tio estas ne la tera homo, per kiu la radioj de la lumo fariĝas *ekkoneblaj* al vi, sed *la lumo en la vorto*.

Se vi nomas vian gvidanton “*majstro*”, tiam sciuj, ke nur *Unu* estas “la Majstro” *en ĉiu* el ni!

Ni estas tio, kio ni estas, por *helpi* vin.

Nenion alian la leĝo postulas de ni.

Nia tasko estas *veki* fortojn en vi, per kiuj viaj koroj estas elŝirataj el ĉia mallumo: – fortoj, kiuj estas en vi mem, – fortoj, kiuj devas fariĝi *konsciaj* al vi, se vi volas lerni uzi ilin.

Nia tasko estas gvidi vin *al vi mem*.

Nia tasko estas ekbruligi en vi la eternan *lumon* de la vorto.

Nia tasko estas igi la *vorton* resoni en vi.

Sed ni povas fari por vi *nenion*, se vi ne volas ricevi helpon.

Ni ne povas helpi vin, se vi ne neskueble kredas almenaŭ je la *ebleco* de spirita helpo, same kiel marve-

turanto kredas trovi firman teron sur la alia flanko de la maro.

Ni estas *homoj de la tero* kiel vi, kaj ni devas kiel vi pagi tributon al la tero.

Ni *agas* kiel homoj de la tero kaj vere *estimas* terajn aferojn.

Sed ni ankaŭ scias pri *tio perfekta*, kio estas la eterna *celo*, al kiu ĉio origininta el la spirito eterne *strebis* sen iam povi *atingi* ĝin.

Se la absoluta perfekteco estus iam *atingebla*, tiam en la momento de atingo ĉiu vivo finiĝus, kaj nur per sia neatinglebeco ĝi donas al ĉiuj eterneco ĉiam novan vivokaŭzon.

Perfekta estas nur la eterne infinitobla *Unu*, kiu, en nenombreblaj formoj, spertas sin mem eterne denove en *Praesto*, *Pralumo* kaj *Pravorto* ...

Ekkonu vin mem

Ne kredu al erarigitaj revuloj, kiam ili diras al vi, ke ĉiu, kiu tion deziras, povas fariĝi lumanto de la *Pralumo*.

Bedaŭrinde ekzistas tro multaj, kiuj estas volonte pretaj kredi ĉiun parolon, se ĝi flatas ilian konsuman-

tan vantecon, – kaj kiuj per sia tuta avida strebado ne atingas pli ol la detruon de sia propra vivovojo...

Kiu ne *naskiĝis* kiel lumanto de la Pralumo, *estinte en la spirito jam de antaŭ jarmiloj tio*, kio li nun estu ankaŭ tie *ĉi en la surtera vivo*, tiu vane provos iam „*fariĝi*“ io, kio li ne *estas* jam de longe en la spirito.

Ne serĉu ion, kio ne mem serĉas vin!

Alie vi povas tre facile subfali al diablecaj mem-trompoj.

La nombro de tiuj homoj, al kiuj la naturo devas malfermi siajn sigelojn, estas ĉiutempe tiom malgranda, ke nur patologia aroganteco povas nutri la mal-saĝan kredon, ke oni eble apartenas al tiu ekstreme malgranda rondo.

Kiu vere apartenas al ĝi, tiu scias ĝin en sia tera konscio ne pli frue ol kiam la gvidanto de lia konscio-edukado transmetis al li la fortojn por spirita agado sur la tero.

Antaŭe neniu tera homo estas kapabla elteni eĉ dum nur unu momento la nekredeble grandan ŝarĝon sur sia konscio, sen rompiĝi sub ĝi, – ŝarĝo kiu necese estas ligita kun la spertado de la identeco de l' tera memsentado kun la neimageble pli aĝa, individue formita, antaŭnaskiĝa vivo en la eterna spirito.

Kiu tie ĉi staras sur sekura grundo, tiu estas dejunece libera de ĉia deziro pri prestiĝo.

Li neniam sopiris mem pri sia tasko.

Sed en la spirito li estis preparita por ĝi antaŭ ol li naskiĝis, kaj kiam venis lia tempo, la patroj en la Pralumo trovis lin perfektigita, kiel oni trovas maturan frukton sur arbo.

En sia surtera vivo, eble li kelktempe strebis serioze al *saĝo*, sed certe estis treege malproksima de li la deziro akiri sekretajn fortojn.

Li humile serĉis *gvidadon*, sed li certe ne alstrebis la konsekron, kiun li poste ricevis sen esti sciinta, ke ĝi estas la surtera sorto de unuopuloj.

Eĉ se li *aŭdis* pri similaj aferoj, li rigardis ilin kiel legendojn aŭ formaĵojn de tro ekscitita fantazio.

Tiel li fariĝis majstro en tio, kio li nesciante estis ekde sia naskiĝo...

Potenco super *okultaj* fortoj, ĉiutempe atribuita al la spirita majstreco fare de homa fabelemo, ĉiam estis rigardata de ĉiu vera lumanto de la Pralumo kiel malestiminda kaj tute ne dezirinda.

Ĉu vi aŭdis, ke ekzistas rimedoj kaj metodoj por akiri tiajn strangajn fortojn?

Vere estus pli bone por vi, se vi scius *nenion* pri tiaj aferoj!

Al la plej multaj el tiuj strebintaj al ili, tiuj fortoj fariĝis *maŝoj*, kaj malĝojiga estis la sorto de la kaptiĝintoj en tiuj maŝoj.

Kiu devas *kiel vokito majstri* okultajn fortojn, tiu estas instruata de vokito, dum multaj jaroj de preparado, kiel mastri ilin kaj kiel defendi sin kontraŭ ilia atako. Eĉ tiam ili povas fariĝi la kaŭzo de lia pereco.

La potenco, per kiu sola okultaj fortoj estas *mastreblaj*, – potenco akirita en severa instruado, – devontigas la posedanton *praktiki* sian povon konstante, kaj rezultas teruraj sekvoj, se lia volo laciĝas *eĉ nur unufoje*.

Unu momento da hezito, kaj da dubo pri la propra potenco, turnas ĉiujn fortojn, al kiuj ĝi povas ordoni, kontraŭ la vokanton, kaj alportas mizeregon kun neantaŭvideblaj sekvoj.

Frenezo kaj mistera morto estas ne la plej teruraj efikoj, kiuj tiumaniere povas estiĝi.

Tiam la kulpo trafas *tiun*, kiu donis la potencon en manojn, kiuj ne taŭgis por ĝi.

Neniu vera spirita majstro ŝargus sin per tia kulpo, kvankam li vere *konas* plej detale la metodojn, kiuj donas ĉi tiun potencon.

Vera spirita potenco staras nepriskribeble alte super *ĉiaj* okultaj kapabloj.

La disĉiplo, kiun spirita majstro alprenas kiel filon, devas esti homo, kiu antaŭe „mortis“ al si mem en la volo de la tero, kaj nun *vivas* en la volo de Dio, en kiu li „naskiĝis“.

Kion la majstro tiam faras, tio konsistas sole en tio, ke, el la Dia esto, li instruas la homon uzi la volon de Dio en si mem kaj konformigi sin al ĝi, kio ofte povas havi miraklecan efikon.

Tiam la tero de la homoj estas la laborkampo de la elektita filo, kaj la regno de la eterna volo lia hejmlando.

Sed kiu strebas al okultaj fortoj kaj provas primajstri ilin per ekstera ekzercado, tiu alvenis nur en la preme humida, krepuska lando de pereigaj deziroj kaj danĝera tento.

Magio en la *plej alta* senso, nome la *Reĝa Arto de tiuj unuiĝintaj kun la spirito*, certe havas *nenion* komunan kun tiu krepuska lando.

La vera mirakleca forto de la Reĝa Arto estas nur *la neniam venkebla volo de la spirito de Dio...*

La homo posedas parton de tiu volo en si mem, tuj kiam li nerevokeble abnegacias sin disde la *volo de la tero* en si.

Sed kiu volas *malligi sin* disde la *volo* de la tero, tiu ne kredu, ke li nun devas ankaŭ „*abnegacii la teron*“.

Nedo de la mondo estas malsaĝo!

Nedo de la mondo estas la narkota trinkaĵo de malfortetaj animoj, kiuj kredas povi eskapi el la realo...

Neado de la mondo ĝuste *ligas vin plej firme al la volo de la tero*, ĉar: – *tio*, kio igas vin „*nei*“ la mondon, estas nur *la nekontentigita volo de la tero*, sed ne la venke forta *pravolo de l' eterna spirito*, pravolo, al kiu ĉio, kio ekaperis per ĝi en la ekzisto, devas *servi*, kaj al kiu *nenio* povas rezisti.

Vi povas *malligi* vin disde la volo de la tero nur per *aktiva* teniĝo de via propra volo.

Sed „*abnegacii* la teron“ postulas de la abnegacianto nenion alian ol *lacan pasivecon*.

La *fuĝo* el la mondo vere *ne* estas rigardebla kiel aktiva agado, kaj en la plej multaj okazoj ĝi estas nur la efiko de psikofizika perturbo, akompanata de la hipertrofia inklino al memĝuado.

Aparte malsaĝaj estas ĉiuj malestimantoj de la „*mi*“, ĉar ili ne scias, *kion* ili malestimas.

Kiam ili diras: „*Batalu* en vi kontraŭ via „*mi*“!“ – ili donas al vi *malbonan* konsilon.

Se „*mi*“ estas estingita, ĉio estas estingita, – ĉar ĉiu *estado* kaj ĉiu *ŝajnado* estas *farita nur de „mi“ por „mi“* – fariĝas *sentebla kiel io aganta nur en „mi“*...

Vi ne povas estingi vian „*mi*“, eĉ se vi per ĉiuj viaj fortoj deziras fariĝi *ne-„mi“*.

Eterna estas la *pra-„mi“*, kiu eterne generas vin el si.

Vi *ne* ekzistus *unu sekundon*, se tiu spirita generado ne volus vian ekzistadon dum nur *milionona* sekundo.

Diru al tiuj, kiuj asertas, ke „mi“ *estingiĝis* en ili:

„Ne vi estas *fariĝintaj ne-„mi“*, sed nur via malsaĝo kredas je tiu neestado *imagita* de vi.“

„Vi *subpremas* tion, kio estas „mi“ en vi, sed vi ne povas mortigi vian „mi“.

„*Erare* vi komprenis la vortojn de la saĝuloj, ĉar la saĝulo estas „mi“ *en sia tuteco*. Ĉio en li estas *subigita* al lia „mi“.“

„Sed kion vi devas *demeti*, estas *tio alprenita*.“

Vi, ho serĉanto, estas „mi“ de *eterne*, eĉ se vi ankoraŭ ne *ekkonas* vian propran identecon en la eterna spiralo de spirita intersekvado.

Ĉio, krom „mi“, estas portempe *alprenita*.

Vi defendas tion alprenitan, kvazaŭ ĝi estus via *propraĵo*, – sed ĉio alprenita ne estas *propra* al vi kun kaj el via prafundo.

Ĉio *alprenita* estos *forprenata* de vi.

Sennombraj alprenitaĵoj jam *estis* forprenataj de vi sennombrajn fojojn...

Via „propra“ *korpo* estas nur *alprenita* en tiu ĉi mondo de – alprenado. –

Sed vi estas „mi“. –

„Mi“ estas *unufoja*, *unika* kaj *nedetruibla* en ĉiu el siaj emanajoj.

„*Dissolviĝo*“ de la „mi“ estas *neebla*.

Tio, kion oni pro koncizeco *nomas* tiel, estas tre komplika proceso de konsciodetruigo, en kiu la konscio antaŭe *unuigita* kun la „mi“ *malligiĝas* disde la „mi“, tiel *perdante* sian eternan „mi“.

„Mi“ estas neeksplikebla, ĉar „mi“ estas *absoluta unueco*, – „*lumo en si*“, kaj *perfekta klareco*.

Laŭŝajna variado de klareco en la „mi“ estas nur la efiko de *konsciomoviĝado*, kiun vi *perceptas* en la „mi“.

La „mi“ estas eterne *generita* el la *pra-„mi“* kaj *restas* eterna *atesto* de eterna generado.

Vi povas *detru* nur *vian konscion* ĉirkaŭ via *nedtruebla „mi“*. – –

Spirite konscia vi povas fariĝi nur per tio, ke via konscio estas *enprenata* en „mi“, tiel, kiel „mi“ *vivas en la spirito* de eterne ĝis eterne...

Ne aliamaniere la „*Patro*“, la „*Pravorto*“, la „*Pra-lumo*“ estas ekkonataj kaj amataj, ol en la „mi“.

Sed tio ĉi estas vi: – vi ĉiuhome *unika „mi“*, – kiam vi *demetis* de vi ĉion, kio estas nur *alprenitaĵo*. – –

Ne serĉu ekstere, ho serĉanto, tion, kio *vivas nur en la plejinterno!*

Neniam vi povas trovi *ekstere* tion, kion vi serĉas.

Neniam vi *scios* pri „mi“, se vi ne antaŭe serĉis kaj *trovis* vian „mi“ *en via plej interna interno*.

Sed vi *trovos* vian „*mi*“ en vi mem nur tiam, se vi restas *spirite sopra* kaj ne permesas, ke via konscio estu konfuzata per la arlekenado, kiun la fantazio de vi mem kaj de *aliuloj* tiom abunde prezentas.

„Mi“ ekzistas en vi nur *unufoje*, – sed sennombraj aferoj provas akiri kaj konservi la regadon en vi, kaŝante al vi sub la *nomo* „*mi*“, ke ili estas nur alprenitaĵoj.

Pri la spiritaj majstroj

Kia do estas la alta komuneco de la spiritaj instruantoj?

Kiel vi atingas ilin, kiuj el la spirito helpante gvidas vin, se vi ne serĉu „ekstere“?

Kion utilas al vi tiuj ĉi vortoj, kiuj devas atingi vin de *ekstere*, se vi povas atendi gvidadon nur *en via plejinterno*?

Ho serĉanto, tiu gvidantaro estas tre proksima al vi kaj vi tion ne scias! –

Ĝi *agas en* vi, kaj vi estas ligita kun ĝi *en vi mem*, sen suspekti spuron de la interligo.

En via ekstera vivo vi povus *logi* dum tagoj kaj noktoj en *la sama* ĉambro *kune* kun unu el la spiritaj

„majstroj“, kiel oni kutimas nomi la lumantojn de la Pralumo, kaj tamen vi ne ekkonus lin kiel tion, kio li estas, ĉar la *unu* majstro, kiu *faris* nin spiritaĵoj, bone kaŝis nian majstrecon antaŭ malklare vidantaj okuloj...

Sed se vi volas vidante proksimiĝi al nia spirita unuiĝo, tiam zorgu, ke vi en vi mem atingu *la spiritan atmosferon*, en kiu ni vivas, – ni, kiuj mem fariĝis vidantaj per la *unu eterna* okulo, al kiu neniu tera senso respondas.

Vi interne perceptos nin ne pli frue ol en la tago, en kiu vi unuafoje troviĝas en plej interna, sendezira *kvieta*, estante plena de *certeco* kaj konfidanta *libereco de timo*.

En tio, *ekstera* kvieto utilos al vi nur malmulte.

Ju pli abunde vi estas *okupita* en via ĉiutaga mondo, – ju pli intense vi scias progresigi la *laboron*, kiun via tasko postulas de vi, – des pli vi proksimiĝas en via interno al la spirita atmosfero, kiu estas vivnecesaĵo al ni, kaj en kiu *sola* regas la neĝenebla *kvieta*, kiun vi devas atingi. – –

Ĉu vi eble amas la romantikan imagon, ke ni „*leonoj de la kvieto*“, kiel oni nomis nin, estas malagemaj revuloj, fantastaj hierofantoj, aŭ eĉ „*joganoj*“ de la dubinda speco, kiun oni vidas en foirejoj?

Ĉu vi kredas, ke la *klaraj okuloj*, al kiuj la mitoj de ĉiuj popoloj ŝuldas subliman ekkonon, eble estas pastroj de misteraj kultoj en sekretaj kriptoj trafluataj de incensa fumo?

Ĉu vi ne povas liberigi vin de la imago, ke ni servas al iu surtera volo, – estas komune ligitaj al iu religio aŭ ideologio ambicianta potencon?

Se vi, ho serĉanto, volas trovi la spuron de la *vero*, tiam vi ne lasu vin trompi de la arlekenaĵoj de via superabunda fantazio!

Sciu, ke inter la spiritaj majstroj agintaj sur tiu ĉi tero estis *majstroj de la glavo!*

Sciu, ke aliaj direktis la sorton de grandaj landoj!

Kelkaj el ni praktikis altajn artojn, aliaj altan sciencon, kaj ankoraŭ aliaj fuĝe evitis kaj evitas ĉian sciencon, ĉian arton.

Kelkaj vivis en grandaj urboj meze de la agada moviĝado de siaj mondo kaj tempo, – sed aliaj loĝis en fora, neatingebla soleco, kiu eĉ hodiaŭ estas la rifuĝejo de preskaŭ ĉiuj el ni.

Laŭ la ŝanĝiĝoj de la tempoj, niaj spuroj estas troveblaj en tre *diferencaj* situacioj de homa surtera ekzistado.

Sed ni tute ne estas *egalaj* inter ni en *ĉiu* spirita rilato, kaj ĉiu unuopa restas libera decidi, ĉu kaj kiom longe li volas resti staranta sur la ŝtupo atingita de li, aŭ ĉu kaj kiam li volas ascendi la sekvantan.

Sed *ĉiu* el ni konstante aŭdas la vokon, kiu vokis lin...

Eble nur malmulto konformus al via ekscesa imago pri la naturo de homoj unuiĝintaj kun Dio, se vi povus ekkoni iun el ni, kiujn oni nomas „*majstroj de la sep pordegoj*“ al la Dieco, en lia tera vesto.

Sed: – lia propra eksteraĵo estas rigardata de la saĝulo nur kiel necesa, surtere postulata *ŝajno*, kaj *ĉiu* ŝajno estas trompa, kvankam oni vere ne devas rigardi ĝin kiel nuran „nenion“.

Kiel la „*nuboj de ekkonado*“ povus fekundigi la grundon, se ili – senditaj en mondon de ŝajno – ne scius agadi kiel ŝajno en ŝajno?

Sed ne kredu, ke vi devus *renkonti* iun el ni, por po-vi fariĝi lia spirita disĉiplo!

„De ekstere“ *neniu* el ni instruas la finajn aferojn.

Kion mi diras al vi ĉi tie, tio povas fariĝi *impulso por via volo* serĉi la veron, sed *ĉiu* instruo, kiun mi povas doni al vi *en vortoj de mia lingvo*, ĉiam restas nur *veka voko al via interno*, ĉar la saĝo de Himavat estas „instruata“ *aliamaniere...*

Ĝi estas bazita *pli profunde* ol nur sur la komprenkapablo de la *cerboj*.

Pli profunde ol *ĉiuj* pasemaj, ŝanĝiĝemaj homaj instruoj kaj skoloj.

Sed vi ne povas vivi en via plej interna interno kune kun la vivantaj „*ŝtonoj de la granda muro*“, antaŭ ol

vi kutimiĝis spiri en *ilia* aero, alte super ĉiuj neniaĵoj de laŭsupoza graveco, kaj alte super ĉiu inteligenteco de fanfaronantaj ĉarlatanoj.

Kiel sono resonas sur *ĉiuj* harpoj en ĉambrego, kiam la fingro de la ludanto pinĉas kordon de *unu* harpo, tiel same ĉiuj sanktaj sonoj sonas por ĉiu disĉiplo spirite enordigita, post kiam li atingis en si la „agordon“ de la „*harpoj de l' sankta monto*“...

Via interna stato estas la ŝlosilo, kiu malfermas al vi la pordon de la sekreta spirita templo.

Nenio povas esti kaŝata antaŭ vi, nenio retenata disde vi, kiam vi *vere* akiris tiun ŝlosilon, – sed ĝi povas malfermi *nur tiom longe*, kiom vi *restos* en la stato postulata de spirita leĝo. –

Sed ne provu aŭdi sonojn aŭ ekhavi viziojn en vi, aŭ percepti vortojn tiamaniere, kvazaŭ ili estus parolataj al vi de ekstere!

Esploru vin mem kaj restu anime maldorma, por ke vi ne subfalu al iluzioj kaj revoj, dum vi volas lerni ekkoni la *realon*!

Serĉu nenion krom la stato de plej interna, sendezire konfidanta anima kvieto!

En la sama grado, en kiu vi proksimiĝas al tiu stato, vi proksimiĝos al *tiuj*, kiuj *kun* vi estas kondukataj sur la vojo al la vero, kaj tute same vi malproksimiĝos de

ili, kiam vi neglektas *konservi* en vi la staton de plej interna sendezira kvieto.

Neniu ekstera aktiveco povas ĝeni tiun kvieton, kiu estas estigata en vi sole nur de via propra interna konduto.

Ne serĉu en anima duonlumo la antaŭsentitajn kunulojn.

Vi povas nur partopreni en la forto jam akirita de ili, kaj vi certe povos ekkonscii tiun pligrandigon de viaj propraj fortoj, – sed pri tiuj unuiĝintaj kun vi en la strebado al la spirito scias nur tiu, kies disĉiplo vi estas, same kiel ankaŭ ili estas liaj disĉiploj.

Ne *cerbumu*, sed estu ĉiam nur konscia de la honesta streĉado de ĉiuj viaj internaj kapabloj *konataj de vi!*

Eĉ ne unu momenton vi devas perdi vin mem el la okulo de via animo!

Alie vi povus perdi la *vojon*, kaj nur post longa tempo vi rimarkus, ke vi *ne plu* estas sur la vojo...

Se vi estas unu el tiuj, kiuj sur tiu ĉi tero ne lasas pasi sian tempon neutiligita, tiam aperos al vi *jam dum tiu ĉi surtera vivo la radiantata tago* en via propra interno.

Tiam vi estos eskapinta el ĉia danĝero, ĉar tiam vi vidos vian vojon *iluminata* per via *propra* klareco.

Sed hodiaŭ via zorgo ankoraŭ ne celu tiun tagon,
kiun vi nur atendu maldorme kaj pacience!

Vi ne scias, *kiam* ĝi doniĝos al vi, kaj *neniu* scias tion...

Vi mem difinas *vian tempon*, kaj devas *plenumi* „vian tempon“.

Sufiĉu al vi la vorto, kiun mi tie ĉi havas por diri al vi:

En la plenumita tempo la perfektigo proksimiĝos ankaŭ al vi.

Ĉiu malpacienco nur malklarigas vian rigardon kaj sekve *malakcelas* vian faradon.

Eterna vi estas, kaj via estas la eterneco!

Kun persisteco persistu!

Trankvile lasu tion „alprenitan“!

Vi devas nur *administri* ĝin bone.

Ĝi tute ne estas via *propraĵo*. –

Strebu ĉiutage kaj ĉiuhore al la alta stato de interna *kvieto*, meze de la bruego de l' ekstera mondo!

Plenigu vin per firma *konfido* kaj *tenu* vin libera de ĉiu *timo*!

Tiel vi proksimiĝas en la spirito al tiu, kiu povas spirite gvidi vin, – tiel vi perceptas en la spirito la altan unuiĝon, el kiu li atingas vin, – – tiel vi fine venas al vi mem en via vivanta Dio!

Danĝero de la vanteco

Sed gardu vin, ho serĉanto, kontraŭ via propra mal-konstanteco!

Gardu vin kontraŭ la dornaj heĝoj de la duboj!

Vi eble antaŭsentas la lokon de la lumo, same kiel dumnokta migranto jam antaŭsentas tra frua nebulo tiun lokon je la ĉielo, en kiu la suno baldaŭ eklumos.

Sed inter vi kaj tiu loko radikas la dorna arbedaĵo de konstante renoviĝantaj *duboj*...

Kiom da ili vi eble elradikigas, tiom multaj elkreskas denove.

Ne disipu vian tempon per malsaĝa farado!

Neniam – eĉ ne dum eterneco – vi povus progresi, se vi arogus al vi antaŭe elradikigi la dornheĝojn de la duboj!–

Tie ĉi helpas sole via persista *kuraĝo*.

Forte kaj firme paŝu antaŭen, eĉ se viaj piedoj sangas el mil vundoj de vanteco!

Via piedo devas esti *pura*, se tiu unu eterna majstro, kiu estas majstro en ĉiu el ni, lasu vin suriri la klare kristalan vojoŝtuparon, kiu kondukas al la halo de adorado en la spirito kaj en la vero.

„Pura“ estas via piedo nur tiam, kiam ĝi estis purigata *en via propra sango...*

Miloj serĉis la vojon al la lumo kaj fiksiĝis en la dornaj heĝoj de la duboj, ĉar la egoisma vanteco de la serĉantoj ne permesis, ke ili paŝu plu antaŭen sen po-vi antaŭe forigi la dornojn.

Vi, ho serĉanto, ne agu kiel ili!

Vi estas ŝirmita, se vi konfidas al la eterna *suno*, kies radio lumas al vi en la lumo de miaj vortoj...

Estante nesentema por ĉio, kio deziras reteni vin, etendu viajn manojn al la helpemaj manoj, kiujn vi nun vidas antaŭ vi!

Silente sekvu vian gvidanton, kiu povas diri pri si:

„*Mi ne plu serĉas la lumon, ĉar mi mem fariĝis lumanta.*“

„*Mi ne plu serĉas la pacon, ĉar mi mem fariĝis paco.*“

„*Mi ne plu serĉas scion, ĉar mi mem fariĝis nepere-onta scio.*“

Rilatigu ĉion bonan al Dio!

Sed ne lulu vin en la vanta aroganteco de tiom multaj, kvazaŭ Dio devus *respondi* ĉiun demandon vian.

Demandu sen hezitemo, kaj ĝoju, kiam respondo *doniĝas* al vi, – sed *trankviligu* vian demandemon,

kiam la respondo ne doniĝas al vi *dum vi ankoraŭ demandas!*

La vundoj, kiujn la *duboj* kaŭzas al vi, estas necesaj por la kreskado de via *fidoforto*.

Tion, kio fariĝas obstaklo por vi, ne evitu senkuraĝe, por ke ĝi retenu vin, ĝis via forto estos pligrandigita por plua paŝado antaŭen!

Ne opiniu, ke vi povus esti vokita por maldensigi, por vi mem kaj aliuloj, ĉiujn heĝojn de duboj, kiel via vanteco volonte murmuretos al vi.

Nur kiam vi lernis *ami* la dubojn, vi scios gardi vin kontraŭ ili.

Nur kiam *neniu* atingita celo donas novan nutron al via *deziro pri prestiĝo*, oni trovos vin kapabla atingi la *plej altan* celon...

Via animo devas lerni *silenti*, se la lumo povu proksimiĝi al ĝi.

Silentado estos la *plej profunda* voko de via animo pri iluminiĝo.

Silente via animo iam eniros en la eternan lumadon.

Ju pli bone vi lernas *silenti* interne, des pli vi proksimiĝos al la ekkonoj, al kiuj via animo sopiras.

La profundaj rigardoj en la regionojn de vera *realo* doniĝas nur al *tiu*, kiu *kvietiĝis* en si mem, ĉar li sciis akiri la *povon de interna silentado*.

Sed ĉiam denove aperas sub mil maskoj via *vanteco*, kiu ĝenas vian internan kvieton per novaj kaj novaj *demandoj*, kiuj ne *povas* trovi respondon tiom longe, kiom vi ne estas *en la granda kvieto*...

Nur kiam vi scias *interne silenti*, vi ricevos en la kvieto de via animo la respondon, kiu liberigas vin por eterne.

Parto II

EL LA LANDO DE LA LUMANTOJ

EN VIA ANIMO ESTAS MALGRANDA PORDO, – PLI MALGRANDA OL POLVERO LUMIGATA DE SUNRADIO.

KIU TRAPAŜAS ĜIN, POVAS VOJAĜI EN FORAJN LANDOJN, SEN ELIRI EL SIA DOMO.

LA PLEJ ANTIKVAJN TEMPOJN LI POVAS SPERTI EN LA HODIAŬA TAGO.

SED NUR MALMULTAJ HOMOJ SCIAS MALGRANDIGI SIN TIOM, KE ILI POVAS KONSCIE TRAPAŜI TIUN ETAN PORDON...

La sojlo

Alveninte en la templo, en kiu li estis konsekrota, la disĉiplo demandis la majstron:

„Ho diru al mi krome, vi certulo, al kiu mi konfidas min jam tiom longe, *kio vi estas antaŭ vi mem* en via scio pri vi mem, – vi, kiu scias primajstri ĉion en vi kaj estas primajstrata de plu nenio?

Ĉu tio, kio vi estas, estas entenata en la *homo*, aŭ ĉu vi trovis en vi mem ion alian, al kio la homo devas servi nur kiel masko?“ –

Kaj la majstro diris:

„Kiel vi, *mi estas homo*, – sed kio mi estis, *antaŭ* ol mia patrino donis al mi la korpon kaj vivon de tiu ĉi tero, tio mi fariĝis *tie ĉi* nur, post kiam mi estis venkinta *la dormon* de l’ homo de tiu ĉi tero.

Nur tiam mi fariĝis la majstro de miaj eternaj fortoj ankaŭ tie ĉi surtere, kiam mi lernis venki la teran *dormon*, en kiu la homoj de tiu ĉi tero provas sonĝi sian vivon.

Se vi nun demandas min, kio mi estas, mi povas diri al vi nur:

Mi estas – *mi mem*, kaj *nur* – mi mem!“

„Vi mem?“ – balbute demandis la disĉiplo...

„Vi mem? – –

Kiel mi interpretu tion?!“

„Ho mia disĉiplo soifanta scion,“ respondis la majstro, – „multon vi jam aŭdis de mi, kaj multon mi povus ankoraŭ diri al vi, – sed multon mi tamen devas *eterne* kaŝi antaŭ vi, se vi ne povas unue diri ĝin al vi *el vi mem!* –

Ĉu vi scios pli pri mi, se mi nun diras:

Mi estas mastro de miaj eternaj fortoj, ĉar mi fariĝis la *memforto* de tiuj eternaj fortoj?

En mi ili nun konscias sin mem, kaj nur en mia volo ili sentas sin volitaj...“

„Do parolu al mi *pri la fortoj*, kies memforto vi estas, ho grandanimulo!“ – petis la disĉiplo.

Kaj la majstro diris:

„Aŭdu, vi serĉanto de la lumo, kaj komprenu en via koro!

Kiam vi dormantaj homoj diras laŭ la maniero de la tero: ni vidas la mondon per la okulo, ni sentas aŭ palpas ĝin, kaj nia orelo sciigas nin pri ĝi, – tiam vi parolas pri nur malgranda parto de la mondo, kiu fariĝas pli aŭ malpli ekkonebla al vi.

Sed mi konas *la tuton* kaj *vivas konscie* en ĝi...

Mi vidas, aŭdas kaj sentas *pli* ol vi.

Mi *vivas en la tuta kosmo*, kiu estas formita el mondoj kiel la via kaj ampleksas en si ĉion, kio estas.

Estante interplektitaj, interpenetrantaj, *ĉiuj* mondoj estas *en la sama loko*.

Kaŝita en via mondo, – vualigita de via mondo de videblaj formoj, – troviĝas la mondo de spiritaj fortoj, al kiuj mi estas memforto el la spirito.

Tiuj fortoj efikas *kreante*, sed ankaŭ: – *per kreado detruante*.

El si mem ili estas senpotencaj, ĉar mankas al ili ĉiu impulso agi el si mem, sed la memforto de unu sola homo estanta „*li mem*“ plenigas ilin per impulsoj al

mempertado, kaj tiel ili fariĝas spirite volitaj potencoj...

La fortegon de tiuj potencoj sentas ĉiuj vivantaj tie ĉi surtere, reĝoj kaj almozuloj, fortuloj kaj malfortuloj, riĉuloj kaj malriĉuloj, sed nur tre malmultaj el ili sentetas, el kiuj mondoj tiu efiko atingas ilin.

Al preskaŭ ĉiuj ĝi estas kaŝita, ĉar ili nur *songe maldormas* en siaj korpoj, dum iliaj animoj dormas. –

Sed aŭdu plu, vi, kiu estu fariĝonta *okulo de la mondoj!*

Interplektita kun kaj enigita en la mondo, kiu *sola* al vi *aperas* kiel la tuta kosmo, kaj samamane interplektita kun la mondo de tiuj ĉi *fortoj de la vivanta fajro*, pri kiuj mi tie ĉi parolas al vi, troviĝas mondo de la pura *lumo*, kiu tralumas ĉiujn mondojn kaj manifestas ilin en si.

Tiujn tri mondojn tenas en si, traflugante ilin kaj spertante ilin en si mem, La Potenculo, kiu *sola* konas sin en Sia *nomo*.

Al ni Li rivelacias sin en silento...

El Li kaj en Li vivas ĉiu, kiu fariĝis vidanta okulo de la mondoj.

Per Li, memforto estas mastro de la fortoj de l' vivanta fajro.

Vi vere povus nomi Lin ankaŭ La Potenculino, ĉar viro *kaj* virino estas entenataj en Li.

En la prakomenco de la estaĵoj nomantaj sin „homoj“, la homo, en la eterna generado el la „Patro“, estis *posedanto* de la memforto kaj *mastro* de ĉiuj fortoj de la vivanta fajro.

Sed kiam la fortoj de la vivanta fajro, kiu brulas sen flamo, montris al la pragenerita homo sian potencon en ĉio vivanta, li forgesis sian memforton, al kiu sola la fortoj de l' fajro ŝuldas sian forton, grandecon kaj potencon, kaj li – *ektimis* ilin...

Timo estas la prakulpo de la homo, – ĉar nur pro *timo* antaŭ la fortoj, kies *mastro* li estis, la pragenerito falis el la eterna lumado.

Vi nun konas la kaŭzon de la malbono tie ĉi surtere.

Ne nur la homo fariĝis ĝia viktimo, sed ankaŭ ĉiuj mondoj, en kiujn la falinto portis sian pra-timon...

Admirante vi staras antaŭ la „mirakloj de la naturo“, sen eĉ iomete senti, ke ĉio, kion vi tie perceptas, originas el *via* nun katenita eterna *spirita volo* kaj estus multege pli *mirakla*, se la regno, kiun vi nomas „la naturo“ kaj al kiu vi mem nun estas ligita, povus ankoraŭ hodiaŭ ekkoni vin kiel sian *mastron*. –

Nun ĉiuj fortoj devas plue efiki en ĝi kiel la radoj en horloĝa mekanismo, kies risorton oni iam streĉis.

Vi sola povas liberigi „la naturon“, eĉ se intertempe pasos milionoj da jaroj.

Sed ne kredu, ke tiu ĉi malgranda kosma korpo, sur kiu ni nun vivas, portas por si *sola* la sekvojn de via „falo“.

Per sia falo el la konscio de sia spirita potenco, la homo kondamnis la tutan fizike percepteblan universon, kun ĉiuj ĝiaj sunoj kaj planedoj, esti sen „Dio“, ĉar nur *al la homo* estis iam konfidita tio, kion nevidebla potencavido, fora de l' spirito, poste uzurpis kiel sian propran regionon de regado.

Per la kulpo de l' *homo*, nenombreblaj vivaĵoj devas *senkulpe* suferi.

Per sia kulpo li submetis sian propran surteran vivon al la *sama* sorto.

Nur fare de la *homo*, kiu, falinte en timon, iam *re-zignis* sian pradonitan potencon, ĉiuj kreitaĵoj povos esti *forŝirataj* el la manoj de iliaj turmentantoj, kiuj rigardas malicaĝoje la nedireblan suferon nevole kaŭzitan de la falo de l' homa spirito. –

Nun aŭdu plu pri la sorto de l' homo, – sorto, kiu ne estus haltigebla, eĉ se komence nur *unu sola* homo estus subfalinta al ĝi.

Kaŭzante novan kaj novan malbonon, ĝi rulas tra la tempoj de ĉiuj terhomaj generacioj, kaj pliigas la timon, – la pratimon –, en ĉiu nova generacio.

Tiel la homo malsupreniĝis de sia spirita potenco kaj sia grandeco bazita en Dio, ĝis finfine pasema *animala formo* prezentis savon al lia memspertado. –

La estaĵoj, kiujn vi nomas „*prahomoj*“, estis la *animaloj*, al kiuj la spirita homo, – la „mastro de la tero“, sin unuigis, post kiam li, venkite de *timo*, estis falinta el sia unuiĝo kun Dio...

Tamen la forto el la alto ne tute forlasis lin!

Vivanta el pradonitaj fortoj kaj trapenetranta la animalan korpon, *kaŝita* al la animalo, kaj *en la animalo vualita antaŭ si mem*, li tamen malklare sentas *memforton* en si kiel fremdan, pli altan estaĵon.

La animalo fariĝis *rifuĝejo* al la falinto, kiu erarvagis sen hejmlando, – ĉar la hejmlando ne plu konis lin, – kaj la animala korpo fariĝis al li ankaŭ la *kaverno de liberiĝo*...

Tuj kiam *memforto* komencas lumi en ĝi, li *ĝojkrias* en la animalo, kaj la *seksardo* de l' animalo malheliĝas en tiu lumo. –

Tial li en la animalo impete deziregas tiun lumon, – kaj, post enpreno de ĉiu nova lumradio, tiu postulanta dezirado pli kaj pli pelas lin renkonte al tiu lumo.

Kelkaj el la estaĵoj, nun surtere nomantaj sin „*homoj*“, – kies kuraĝo estis fortigita, ĉar ili vidis el la spirita regiono la timoplenan animalan penadon, al kiu ili mem iris renkonte, – strebis al la lumo kun ti-

om da energio, ke la lumo povis reatingi ilin jam antaŭ ilia surtera naskiĝo.

Memforto denove fariĝis ilia *propraĵo*.

Ili fariĝis la unuaj helpantoj de siaj fratoj dormantaj en la animalo, kaj de la fratinoj de tiuj fratoj.

Ili fariĝis la vidantaj *okuloj de la mondoj*.

Ili mastras *la fortojn de la vivanta fajro*, kiuj servas al ili kun fajra fervoro...

Ĉu vi nun scias, kio mi estas? –“ demandis la majstro post tiu parolado.

Kaj lia disĉiplo, kvazaŭ vekiĝante el sonĝo, konfuzite respondis, dirante:

„Jes, sinjoro. – Mi kredas nun senti, kio vi estas.

Sed klarigu al mi, – vi, kiu jam klarigis al mi tiom multe, – ĉu estis via *patro*, kiu heredigis al vi tiun spiritoforton, aŭ ĉu la korpo de via *patrino* donis al vi la kapablon de tiu ekkonado?

Pardonu al mi, se mia demando eble rilatas al pli, ol kiom vi volas respondi al mi!

Vi scias, ke mi klinas min antaŭ vi kun respekto, – sed mia okulo ne povas forgesi, ke ĝi vidas vin antaŭ si kiel homon, formitan kiel aliaj homoj, kaj vane ĝi provas explore malkovri je vi tion, kio estas la korpka kaŭzo de via luma ekkonado.“

„Malsaĝulo!“ respondis la majstro, „mi supozis, ke vi demandis pri *mi!* – ke vi deziris ekscii, *kio mi estas!*“

Sed vi demandis pri la *animalo*, kiu tie ĉi ankoraŭ servas al mi kiel nutraĵo, kaj estas konsumata de mi per tio, ke mi *vivas* en tiu ĉi mondo *per ĝiaj fortoj*. –

De kie mi ekhavis tion, pri kio mi parolis, tion mi ree diris al vi hodiaŭ.

Sed vi ne aŭdas, kion oni diras al vi, ĉar vi ankoraŭ dormas la dormon, en kiu vi, kiel la aliaj homoj, *pensante sonĝas* vian vivon!

Sciu, ke miaj vortoj donis al vi *scion en la Pralumo*, kaj ke nur tiu, kiu posedas *memforton*, akiras scion en la Pralumo! –

Sed nun *vi* diru al mi, kio vi estas, – – ĉar la leĝo postulas, ke mi direktu al vi la saman demandon, kiun vi direktis al mi en tiu ĉi sanktejo.

Kio estas vi?! – Vi, kiu estas primajstrata de tiom multe kaj ĝis nun lernis primajstri tiom malmulte! —“

La disĉiplo respondis:

„Majstro, vi demandas min per maldolĉaj paroloj pri io, kion certe *nur vi* povus diri al mi. –

Mi – – ne scias!“

Kaj la majstro diris:

„Neniam homo estis tiom aŭdaca kiel vi!

Kiel vi povis eniri en tiun ĉi templon, – kiu ellasas neniun, kiu ne scias respondon al mia demando, – se vi eĉ ne kapablas diri, kio vi estas?!

Malfeliĉa *nenio*! – Se vi ne estas sufiĉe *saĝa* por respondi, mia demando veku almenaŭ vian *prudenton*, por ke tiuj ĉi muroj ne vidu vian pereon!“

Apenaŭ regante sian voĉon pro ekscitiĝo, kaj tremante per ĉiuj membroj, la disĉiplo donis jenan respondon:

„Vi, kiu ĉion amas, – kiel vi povus permesi, ke via disĉiplo estu mortigata nur tial, ke li tie ĉi ne scias respondon al via demando! –

Eble mi vere estas *nenio*, kiel vi diras, – kvankam via vorto eble entenas kaŝan sencon.“

„Vi malsaĝulo!“ replikis la majstro per malvarma voĉo, kaj maldolĉe mokante daŭrigis: „Vi estas ne nur *nenio* en iu ajn *sekreta* senco, sed laŭ la *ĝenerala* senco de la vorto!

Nenion mi vidas, al kio mi povus transmeti la grandan *konsekron*, kiun transdonas unu el ni al la alia ekde la tempo, kiam la unua el ni ricevis ĝin de la Pravoro el la Pralumo.

Nenion mi vidas antaŭ mi, kio povus *porti* tiun konsekron, tiom longe, kiom vi ankoraŭ ne scias, *kio vi estas!*

Antaŭe *mia disĉiplo* staris tie ĉi.

Nun mi *vidas nenion*, kaj *parolas* al *nenio*.“

Jen la disĉiplo ekkriis kiel februlo:

„Majstro! – Mia instruanto! – – Vi mokas vian disĉiplon!

Vi *volas* pereigi min!

Vi *parolas*, kiel vi antaŭe neniam *parolis* al mi!

Vi *scias*, kiu staras antaŭ vi!

Vi *scias*, kio mi estas!

Vi *scias*, ke mi ne starus ĉi tie antaŭ vi, se *vi* ne estus *vokintaj* min!“

„*Kio tie ĉi aŭdacas insulti min?*“ respondis malestime la majstro.

Kaj la disĉiplo kriis tiom laŭte, ke lia voĉo akre resonis de la malhelaj muroj:

„Ĝi estas *MI!!* – – Sed mi ne *insultas!*

MI, via disĉiplo!!

Ĝi estas *MI MEM*, kiu ĉi tie staras antaŭ vi!!“

Elkriinte tiujn vortojn, la disĉiplo perdis la konscion kaj sinkis sur la plankon kvazaŭ senviva.

Finfine, post longa kaj profunda dormo, li vekigis.

Apud la lito, sur kiun oni estis metinta la preskaŭ senvivan, staris la majstro.

La disĉiplo ĉirkaŭrigardis kaj ne plu ekkonis la lokon, ĉar li nun estis en la *interno* de la templo.

Sed tiam li ekvidis la *majstron*, vidante, ke lia vizaĝo lumis pro *ĝojo*.

„Leviĝu,“ diris la majstro per amoplena voĉo, – „leviĝu kaj supreniru sur la unuan el la sep ŝtupoj, kiuj kondukas vin al la *plejsanktejo* de l’ templo.

Tie vi akiros la forton, al kiu la fajraj fortoj *obeas*...

Vi trapasis la *provon de la sojlo*, ĉar je la unua fojo ĉiu fibro de via korpo fariĝis – *vorto!* –

Antaŭe nur *kapo* kaj *koro* estis vivaj.

En la krio de via mortotimo *ĉio* en vi ekvivis!

Nun *la homo* en la animalo ekkonsciis *sin mem*, kaj la *dormo* estas *venkita!*“

La disĉiplo aŭdis tiujn vortojn kaj ne komprenis, kio okazas al li.

Ankoraŭ iom dubante, li prenis la manon de l’ majstro kaj diris:

„Ho vi bonkorulo! – Kiom granda estas via koro! – Kion mi faru por danki vin?“

Sed la majstro skuis la kapon kaj diris per voĉo plena de trankvilo:

„Supreniru sur la ŝtuparon!

Kaj se vi kapablas plenumi tiun ĉi taskon, kiel oni *devas* plenumi ĝin, – tiam mi vin revidos.

Kiu estas *matura* por trovi, tiu *estos trovata* tie ĉi.

Sed se vi venis *tro frue*, tiam vi *eĉ nun* ne eskapos el tiuj ĉi muroj.

Adiaŭ!

Eble vi revidos min!

Vi ankoraŭ staras antaŭ la lasta tasko!“

Tiam la majstro silente kondukis sian disĉiplon tra longajn kaj kurbajn koridorojn malhelajn, – kaj li silente forlasis lin, kiam ili estis alvenintaj antaŭ la sep altaj ŝtupoj.

Sola, sen ia helpo, la disĉiplo devis provi supreniri.

Per firmeco, koncentriĝo kaj fera volo li sukcesis, post longa kaj vana penado, fine atingi la alton de la *unua* ŝtupo.

Ĉiu *nova* ŝtupo estis multe pli malfacile surgrimpebla ol la *antaŭa*.

Ofte liaj fortoj minacis forlasi lin.

Sed la *sepa* ŝtupo estis preskaŭ ne surgrimpebla, ĉar ĝi estis – *tiom alta kiom li mem...*

Per sia lasta forto la disĉiplo devis provi ascendi ĝin superante sin mem, ĝis, post neesprimebla streĉado de siaj fortoj, li finfine sukcesis svinge suprenlevi sin sur la plej altan ŝtupon.

Tie ĉi montriĝis libera la vojo al tio plej sankta de la sanktejo.

Alveninte en la plejsanktejo de l' templo, la disĉiplo tie trovis ĉiujn, kiuj *antaŭ* li estis ascendintaj la saman

ŝtuparon, kaj li ekvidis inter la kolektiĝintoj ankaŭ la majstron, kies disĉiplo li estis.

Ekvidinte lin, li volis danke kisi liajn manojn, ĉar li ja sentis, kia ŝanĝiĝo estas okazinta al li mem, kaj ke li nun *posedas* la forton promesitan al li de la majstro, se li povos ascendi la sep ŝtupojn.

Sed la *plejaĝulo* el tiuj, kiuj troviĝis en la plejsanktejo de l' templo, bonkore rifuzis akcepti dankon, dirante:

„Al *kiu* vi volas danki, – se ne al *Tiu*, en kies *nomo* vi fariĝis *vorto*?“ –

Jen *ni ĉiuj* estas: – *unu en Unu!* –

En vi estis tio, kio vokis nin al vi! –

En vi estis tio, kio volis atingi sin mem!–

En vi estis tio, kio estis perfektigata en vi! –

Ni, – *ĉiuj unu*, – vivas en *Tiu*, kiu unuigas nin!

Ekkonante Lin, ni Lin adoras – en ni mem... “

Tiel la disĉiplo estis *mem* fariĝinta majstro, kaj nun unuiginta kun ĉiuj, kiuj antaŭe gvidis lin, trovinte lin preparita por la *eterna unuiĝo*, – jam antaŭ lia naskiĝo tie ĉi surtere.

La demando de l' reĝo

„Ekspliku al mi, senmortulo,“ komencis la reĝo, – „kial ĉiu saĝulo instruas *alian* saĝon? –

Ĉiu el ili nomas sian instruon *vero*, kaj tamen iliaj instruoj estas tute malsamaj.“

„Ili ĉiuj instruas *la samon*,“ – parolis tiu, pri kiu ili diris, ke li atingis *la grandan unuiĝon*, kiu faras ĉiun, kiu atingis ĝin, *unuiĝinta kun ĉio*, tiel ke li neniam plu povas esti en kverelo *kun si mem*, kaj *neniam plu estas apartigebla* disde la eterne unuecaj *ekkonantoj en la pragenerita lumo*.

„Pardonu, granda instruanto, ke mi devas kontraŭdiri al vi,“ – respondis la reĝo.

„Mi ensuĉis la instruojn de multaj saĝuloj, kaj ĉiu gustis alie.

Iu parolis pri multaj *korpaj* naskiĝoj de la sama individua vivo en *multaj* korpoj estiĝantaj denove post ĉiu perdo de korpo, – sed alia sciis pri multaj *animaj* naskiĝoj en nur *unu*, *unufoje* prezentita korpo, dum *unu sola* vivo sur tiu ĉi tero. –

Iu rigardis diojn kiel *juĝistojn*, – por alia la homo staras alte *super* ĉiuj dioj, kaj laŭ tiu instruo perfektiginto povas *ordoni* al dioj.

Kiel vi volas *akordigi* ĉion ĉi?! –“

„Estas parolate pri *unu* vero en *ĉiuj* ĉi instruoj,“ diris la saĝulo.

„Sed kiel tiuj instruoj povas proklami tiom *diferencajn* aferojn, se ili reale entenas nur *unu*, *la eterne saman* veron? –“ demandis la reĝo.

Kaj la saĝulo respondis al li:

„Granda reĝo, aŭskultu parabolon!

Iu majstro sidis, en radiante hela tago, kune kun siaj disĉiploj ĉe la bordo de l’ maro.

Neniu ondo ĝenis la senliman spegulon, kaj la kupolo de l’ ĉielo lumis kvazaŭ unu sola gemo.

Jen la disĉiploj petis la majstron, ke li eniru kun ili en boaton, por ke ili remante povu veturigi lin al la alta maro.

La majstro eniris en la grandspacan boaton, kaj liaj disĉiploj remis, ĝis la marbordo estis malaperinta for de iliaj okuloj.

Kiam ili ripozis en la ombro de etendita veltolo, la majstro diris:

„Mi volas provi vin, surbaze de viaj propraj paroloj, ĉu vi jam vidas tion, kion mi provas instrui al vi vidi.

Tial diru al mi, kion vi vidas!“

La unua el la disĉiploj ekvidis sian bildon sur la glata akvosurfaco kaj tre admiris, kiom fidele tiu spegulo reflektis ĝin.

La dua rigardis super la maron kaj trovis ĝian finon tie, kie la volbo de l' ĉielo ĝin tuŝis, – kaj ĉar li bone sciis, ke en tiu distanco prezentiĝus al li la sama bildo, la sentado de tiu neimagebla vasteco kaptis lian koron, kaj li kortuŝante laŭdis per respektplenaj vortoj la senfinecon.

Tiam la tria parolis pri la svarmo da fiŝoj moviĝantaj ĉirkaŭ la boato en la profunda klara akvo, kaj li amoplene priskribis iliajn flekseblajn formojn kaj la irizantan brilon de iliaj skvamoj.

Do ĉiuj parolis pri *malsamaj* aferoj, kvankam ĉiuj estis *en la sama loko*. –

Nun la kvara parolis pri la *lumo*, kiu ĉion ĉirkaŭradiis, kaj poste, kvazaŭ ebriiĝinte de tiu lumo, laŭdis elokvente kaj laŭte la fajrobrilan astron, al kiu ŝuldiĝas la tuta tera lumo. Kiam li estis fininta, la aliaj tri disĉiploj atente rigardis sian majstron, ĉar ŝajnis al ili certa, ke nur la kvara donis la respondon atenditan de la majstro.

Kaj la majstro diris:

„Mi vidas la sunon kaj vidas la lumon, – mi vidas la ŝajne senliman vastecon, – vidas la animalojn de l’ maro, kiuj ĉirkaŭas la ombron de nia boato, – kaj mi ankaŭ vidas min mem en la likva spegulo, – – sed – mi vidas *pli*, kaj mi volas instrui al vi vidi pli ol ĉio ĉi!“

„Ho diru al ni, amata instruanto, kion *alian* vi vidas krom ĉio ĉi!“ – petis la kvar disĉiploj kvazaŭ el unu buŝo.

Sed la majstro diris:

„Ĉu mi ankoraŭ ne sufiĉe parolis al vi pri tio?

Dum multaj monatoj mi parolis al vi pri tio, kion mi vidas, kaj vi ankoraŭ ne scias ĝin?“

La disĉiploj vokis:

„*Neniam* antaŭe, majstro, vi estis kun ni sur la maro, kaj vi diras, ke vi parolis al ni pri tio!?“

„Ĉu mi diris, ke mi rakontis pri la *maro*, aŭ ĉu mi ne anstataŭe parolis pri tio, *kion mi vidas?*“ respondis la majstro, kaj daŭrigis tiele:

„Vi veturigis min ĉi tien al la alta maro, kaj vi kredis, ke mi volas aŭdi vin paroli pri la maro, pri ĝia vasteco, kaj pri la lumo verŝiĝanta sur ĝin.

Sed la maro rakontas sin *mem*, kaj *ĉio* rakontas sin mem, kio tie ĉi ĉirkaŭas nin!

Se estus *mil* disĉiploj tie ĉi ĉirkaŭantaj min en siaj boatoj, tiam miaj oreloj aŭdus mil rakontojn de la ma-

ro, de la lumo kaj de la senfineco, – rakontojn aŭdebligintajn en la lingvo de la homa buŝo...

Sed ĉu okazus io alia en la palmaro? –

Aŭ sur la neĝkovritaj montoj de Himavat? –

Ankaŭ arbaro kaj montaro rakontas sin mem, kaj mi ne bezonas demandi vin, se mi volas aŭdi ilian rakonton.

Sed mi ja volis aŭdi per vi pri *tio*, kion mi vidas en *ĉiuj* lokoj, kaj kio tamen estas sentempa kaj senloka!

Kiu *tion* vidas, tiu forgesas la rakontojn de la ĉielo kaj maro, de la montoj kaj arbaroj! – –

Vi ankoraŭ serĉas *ekstere*, ĉar via interna regno ankoraŭ ne vidas sunon kaj tial estas malluma...

Sed kiam vi estos fariĝintaj „*reĝoj*“ de viaj regnoj, tiam ĉio ekstera devas veni al vi kaj pagi tributon, kiam ajn vi ĝin postulas.–

Lasu do ĉion eksteran rakonti sin mem tiel, kiel ĝi volas rakonti sin, kaj ne metu demandojn, kiuj nuntempe ja certe ne estos respondataj al vi de ekstere!

Atendu, ĝis vi estas *mastroj en vi mem*, por ke ekstere oni *devu* doni al vi, kion vi *postulas*, ĉar se vi eliras kiel *almazantoj*, oni donos al vi tion, *kion doni oni pretas!*–“

Aŭdinte tiun parolon, la disĉiploj hontante silentis, kaj ĉiu konservis la vortojn de l’ majstro en sia koro.

Ĉar vesperiĝis, oni nun penis per forta remado reproksimigi sin al la marbordo, kaj ĉiu remmovo fari-

ĝis al la disĉiploj ĵura promeso unue strebi al la mastreco en si mem, antaŭ ol meti demandon al tio ekstera.“

„Laŭ tio“, diris la reĝo, kiam la saĝulo estis fininta sian rakonton, – „laŭ tio mi inklinas supozi, ke malsameco de la instruoj ekzistas nur ĉe tiuj, kiuj ankoraŭ troviĝas „*ekstere*“. –

„Vi estas prava, ho reĝo“, – diris la perfektiginto, – „tamen vi ne forgesu, ke tiuj donantaj komunikon pri sia *interno*, fariĝinte mastroj en si mem, same povas paroli nur laŭ *sia* maniero! –

Se vi volas ekkoni la veron tute laŭ *via* maniero, vi mem devas serĉi ĝin *en vi mem!*“

Ĉar la reĝo nun silentis, la saĝulo leviĝis, kiel homo scianta ke oni ne plu bezonas lin, trapaŝis la reĝan sekvantaron kaj foriris, enprofundiĝinte en sian internan lumon.

Sed la reĝo konsiliĝis kun si mem, ĉu li mem deziras fariĝi vidanto de la vero.

Post iom da tempo li rezignis siajn pensojn kaj diris al si mem:

„Kiu scias, ĉu mi *trovus* en mi la veron?

Kiu scias, ĉu ĝi jam antaŭ longe forlasis min, ĉar ĝi trovis sin forlasita de mi?

Kaj kial mi *mem* rigardu al la vero en la okulon?

Eble mi ne estus mem certa pri mia vero, kaj kiel mi tiam povus scii, kio estas vero?

Sed en mia lando loĝas multaj saĝuloj, kaj ĉiuloke instruas spertaj instruantoj.

Al mi, la reĝo, ili devas paroli pri sia plej pura ekono, kaj mi povas akcepti, kion mi volas.

Ankaŭ miaj prauloj rigardis kiel veron nur *tion*, kion ili *volis akcepti* kiel veron, kaj mi volas rezervi al mi la saman liberecon!“

Tiel okazis, ke tiu reĝo restis sen ekkono de vero ĝis sia morto.

La migrado

La disĉiplo, kies hejmlando estis en Okcidento, malproksime de la granda montaro, je kies deklivoj la majstro vivis, ĵus metis demandon pri *la alta instruanto el Nazareto*, kaj petis pri instruo.

„En mia lando“, diris la disĉiplo, „ekzistas multaj famaj instruistoj, kiuj ne kredas, ke tiu majstro iam paŝis sur la tero, kaj ili opinias, ke legendo formis lian figuron, – kelkaj eĉ kredas, ke la rakontoj pri lia vivo estas nur vualitaj raportoj pri stela mito, kiu estis sankta al la homoj de la pratempo.

Vi, ho purulo, jam ofte parolis vortojn al mi, kiujn vi probable intence transprenis el la libroj, kiuj rakontas pri la vivo de la juda instruanto kaj pri lia instruo.

Vi estis plena de respekto, kiam vi nomis lian nomon, kaj se mi ne miskomprenis vin, vi rigardas lin kiel starantan pli alte ol *ĉiuj* aliaj, kiuj iam iris la vojon de unuiĝo.

Kial do mi ne trovas vin inter la konfesantoj de tiu juda majstro, tiom alte respektata ankaŭ de vi?“

Tiel demandis la disĉiplo, ĉar li ankoraŭ ne sciis, kiu estas „*la majstro*“ en *ĉiu* majstro naskita el la spirito...

La demando nur ridetis bonkore kaj kompreneme, sed li ne respondis.

Tiam la disĉiplo, ekdubinte pri la dececo de sia demando, diris kun ioma embaraso:

„Probable vi pravas, vi, mastro de spiritaj fortoj, pri kiuj miaj instruistoj en Okcidento povis rakonti al mi nenion, se vi interne moke ridas pri mia demando!

Eble vi rigardas nin, la homojn de Okcidento, plene de kompatato. –

Sed tamen mi petas vin respondi almenaŭ jenan demandon: –

Ĉu ne estus multe pli bone por ni Okcidentanoj, se ni estonte ignorus la instruon de tiu juda instruanto,

kiel legendon, kiu hodiaŭ havas plu nenion por diri al ni?

Ĉiu tempo ja havas sian adekvatan *propran* manieron proksimiĝi al la vero.“

Ĉe tiuj paroloj la majstro haltis.

La du migrantoj nun estis atingintaj la altaĵon, kiu limas la akvon de unu rivero disde tiu de alia.

Potenca ŝtona kolono, havanta kvarangulan transversan sekcon kaj kiu pratempe estis skulptita el unu sola roko, signis la lokon.

En la skribo de tiu lando ĝi portis, en digne granda, profunde ĉizita formo, la sanktajn silabojn:

OM MANI PADME HUM –

kio signifas: „Vere, la floro de lotuso entenas la sekreton.“

Sube de tiuj vortoj troviĝis signo indikanta al fremdaj pilgrimantoj la vojon al la celo de ilia pilgrimado.

„Ĉu vi ne pensas, ke estus pli bone“, komencis la majstro, kvazaŭ li, enprofundiĝinte en propraj pensoj, ne estus aŭdinta la demandon de l' disĉiplo, „se tiu gigante granda malnova kolono malaperus for de tie ĉi?

Ĉe la popoloj de via raso mi vidis aliajn aferojn, kaj mi pripensas la planon, ke el la granda suda urbo estu alportata ĉi tien unu el la modernaj vojmontriloj, bele pentrita kaj diverse ornamita, tia, kian vi homoj de Okcidento scias fandi el fero.

La pilgrimantoj vidu, ke la monaĥoj sube en la monaĥejo ne estas tiom vivofremdaj, ke ili ne scias alkonformigi sin al sia tempo!

La kolonon jam de longe malmoderniĝintan oni ti-am povas faligi, lasante ĝin dispeciĝi en la abismo tie apud la pilgrimada pado.

Ĉar kion tiu rokbloko povus hodiaŭ havi por diri al ni? –

„Vi ne parolas serioze, majstro!“ respondis terurite la disĉiplo.

„Certe oni povas vidi, ke la kolono estas tre aĝa, sed ĝi montras la grandajn, simplajn formojn, kiuj neniam povas arkaikiĝi, kaj la sanktaj silaboj estas enĉizitaj en skribformo, kiu rilate al beleco ne estas komparebla kun iu ajn alia.

Kiel vi povus detruigi tiun potencon verkon de plej alta digno, por starigi anstataŭ ĝi barbare sengustan tabulon el giso, kian hodiaŭ oni bedaŭrinde vidas en ĉiuj stratoj?

Ĉu la sanktaj silaboj estus por vi tiom indiferentaj, ke vi povus toleri, ke oni pentrus ilin sur tiom mizeran multkoloran vernison?

Krome, en tiu ĉi alto tiu materialo, elmetita al ĉiuj ŝtormoj, daŭras nur tre mallonge.

Sed la kolono, skulptita de arte lerta mano el unu sola roko, staras tie ĉi jam ekde antaŭ pli ol mil jaroj, kaj povos dum pliaj miloj da jaroj montri al ĉiuj pilgrimantoj, vidantaj ĝin de malproksime, la vojon al la templo, – kaj ĝi estas mem alta sanktaĵo, vere inda je la Dieco!

Vi certe ne parolas tute serioze, ĉar kiel povus tio, kio ĉi tie kvazaŭ parolas al la rigardanto, esti eĉ nur unu momenton kaŝita al vi, kiu perceptas ĉiun homan sentadon?“

La majstro *ree* ridetis, kaj *silentis* kiel antaŭe.

Tiam ili pluiris.

Silente ili migris valen, al la vastaj konstruaĵoj de la malnova lamaa monaĥejo, en kies proksimeco la majstro havis sian retiriĝejon.

Sed la disĉiplo meditis pri tio, kial lia instruanto ĉiam denove devigis lin respondi *mem* ĉiun demandon, – same kiel li estis farinta ankaŭ hodiaŭ, post lia demando rilata al la *majstro de Nazareto*...

Paska nokto

La kreneloj kaj turoj de la templourbo desegnas delikatajn siluetojn en la aero ebria de la lumo de l' plenluno.

La vasta valo estas plena de arĝenteca lumado, kaj super la senarabaj altaĵoj de la Judea montaro kuŝas kvazaŭ brilanta ringo.

Ni estas malproksimaj de la urbomuro, kaj antaŭ ni troviĝas olivarbaro.

Ĝi premetas sin, kvazaŭ grize verda nuboj, al la kru-
da deklivo de monteto.

Proksime al la vertikala rokmuro kreskas linio da gravaspektaj malhelaj arboj – oni povas ekkoni, ke homa volo aranĝis ilin tiel – kaj ili nun strebas super la grize verdan nubon da foliaro, kvazaŭ aro da nigre kirasitaj gardantoj.

Regas plej profunda kvieto.

Sed jen: – ĉu ne ĵus aperis io simila al blanka figuro tie je la rando de la olivarbaro, kie ombroj apartigas ĝin de la asfodelkovrita deklivo? –

Jes! – Io moviĝas tie.

Ĝi estas homo!

Iu en blanka vesto malrapide elpaŝas antaŭen, ŝirmas la okulojn per sia mano, probable ĉar la luna lumo estas tro akra, kaj explore rigardas la liberan terenon.

Proksima vojo kondukas al la montaro.

La vojo kuŝas kvazaŭ hela ŝnuro, kiun iu senatente lasis fali.

Oni povas bone sekvi ĝin per la okuloj, ĝis en modera alto ĝi perdiĝas malantaŭ rokoj.

La observanto estas ankoraŭ serĉe rigardanta al ĉiu flanko, sed li evidente trovas nenion, kio povus maltrankviligi lin.

Nun li reiras en la bluan ombron kaj malaperas inter la olivarboj.

Kion do li intencis?...

Oni ree vidas eklumi ion blankan, sed tiuĉifoje devas esti pluraj homoj, ĉar oni rimarkas samtempe tie kaj tie, inter la kurbaj trunkoj, blankajn makulojn aperi kaj remalaperi.

Unu ĵus elpaŝas el la olivarbaro.

Ne, – ankoraŭ unu!

Ili portas ion.

Ĝi ŝajnas esti peza, altvalora ŝarĝo...

Nun venas du *pliaj*, kaj oni povas vidi, ke devas esti homo, aŭ eble homa kadavro, kiun tiu kvaropo tiom zorge portas.

Ankaŭ ĝi estas kovrita per blanka tuko.

Kio okazis tie? –

Ili senbrue paŝis tra la asfodelkovrita deklivo kaj nun atingis la vojon.

Oni nun vidas eĉ pli klare, ke ili portas iun el la siaj. Sed li devas esti mortinto!

Tra sub liaj genuoj ili metis longan, larĝan tolon, kiu etendiĝas ĝis transe de la ŝultroj de la du antaŭirantoj.

La du antaŭaj portantoj tenas ambaŭmane la kuntorditan tukon, kiu kuŝas sur iliaj ŝultroj, kaj ili portas pezan ŝarĝon.

Sed tiuj irantaj malantaŭe apogas la supran korpoparton de l' mortinto, tenante ĝin ĉirkaŭ la dorso kaj sub la brakoj.

Lia kapo ŝajnas esti apogita inter iliaj ŝultroj.

Iri estas malfacile por la kvaropo...

Nur malrapide ili paŝas antaŭen.

Irinte kelkan tempon kaj fariĝante malpli bone ek-koneblaj al niaj okuloj, ili ŝajnas memgarde ripozi.

Oni povas ankaŭ supozi, ke ree ili rigarde esploras la terenon; sed eĉ dum ilia ripozo ili zorge tenas sian mortinton en la sama pozicio, en kiu ili portis lin ĝis nun.

Ili devas esti tre aminta lin, dum li ankoraŭ vivis.

Tiel oni portas neniun, kiun oni ne amis.

Montriĝas *solena respekto* en la maniero, en kiu ili portas lin...

Ili pluiris.

Nun ili jam estas tre proksimaj al la montaro.

Oni vidas ilin jam nur kiel ion blankan, kio malrapide moviĝas, kaj persono, kiu antaŭe ne vidis ilin, povus apenaŭ ekkoni ilin sur la blanka vojo.

Nun ili iras malantaŭ la rokojn, kiuj malaperigas la vojon.

Nun oni vidas plu nenion de ili...

La lumo de la luno kuŝas sur la tereno, arĝente trembrilante.

La vojo ree aspektas, kvazaŭ neniam antaŭe iu estus paŝinta sur ĝi ...

Jen sovaĝa krio – eksonanta de tie, kie la malhela linio da arboj superas la olivarbaron!

Kaj jen aliaj krioj, senbridaj kiel laŭta malbenado de furiozaj militistoj, kaj el la malhelo aperas ruĝa lumo de torĉoj, kiu same kiel la bruego rapide moviĝas al la urbomuro.

Oni vidis la torĉolumon nur tiom longe, kiom ĝi radiis sur la malhelan rokomuron kaj la linion da nigraj arboj.

Tiam ĝi estis tute englutata de la hela lunolumo.

Nun plu nenio estas ekkonebla.

La vojon al la urbopordego oni ne povas vidi de tie ĉi, alie oni supozeble devus ree vidi la ruĝajn torĉojn en la ombro de la urbomuro.

Sed oni vidas tri krucoformajn pendigilojn, starigitajn sur la senarba monto Golgota ekstere de la urbo.

Sur du el ili la pendigitoj ankoraŭ estas videblaj, sed ŝajnas, ke la tria pendigilo ne portas viktimon...

Jes, oni nun povas klare vidi, ke neniu pendas sur ĝi!

Estas ja tiom hele en tiu ĉi nokto.

Kial do ĝi estis starigata?

Iu devas esti pendigita sur ĝi!

Kial oni lin deprenis?

Ĉu li estis tiu, kiun la blankaj viroj forportis?

Se jes, tiam li certe mortis rapide, ĉar en kelkaj okazoj ili pendas tie dum pluraj tagoj, kvazaŭ ili estus jam mortaj, ĝis subite ili ekhurlas kiel sovaĝaj bestoj, kaj oni ekkonas, ke ilia fino ankoraŭ ne venis.

Eble li estis iu, kiu ne povis elteni multan doloron, aŭ iu, kiu jam estis preskaŭ mortinta pro la torturado fare de la romiaj bandanoj, antaŭ ol ili pendigis lin.

Sed kial oni deprenis lin? –

En la olivarbaro ree regas kvieto.

Ni iru tien por ekscii, kio estis la kaŭzo de tiom da bruego.

Certe plu neniu estas tie.

Sed tio ne estas olivarbaro!

Tio estas malferma ĝardeno de riĉulo!

Sur bonaj vojoj ni jam atingis la altajn, malhelajn arbojn.

Ĉu tie ne estas aperturo ĉizita en la rokmuro?

Jes, vere! – Ĝi estas *tombo!*

Estas malhele tie ĉi, ĉar la luna lumo estas retenata de la rokmuro, kaj ni ne havas lumilon.

Ŝajnas, ke la kaverno estas tre longa, sed oni ne kuraĝu iri antaŭen, por ne fali en kaŝan abismon.

Jen *ree* venas blanka figuro!

Kiu ĝi povus esti?

Certe la proprietulo de la ĝardeno.

Sed kion do li faras tie ĉi dumnokte?

„Ĉu vi apartenas al la homoj serĉantaj tiun, kiu estis entombigita ĉi tie?“

„Ne, ni ne scias pri iu entombigita tie ĉi, – ni nur vidis, ke kvar viroj, vestitaj kiel vi, portis mortinton el ĉi tiu ĝardeno en la direkto al la montaro, kaj tiam ni aŭdis grandan bruegon kaj tie ĉi vidis torĉolumon.“

„Konservu kiel sekreton tion, kion vi vidis, – sed sciuj: kvankam la homo, kiun vi vidis, dum oni elportis lin, estis mortinta per torturado, li tamen *vivas!*“

„Ni vidis antaŭe, ke sur unu el la pendigiloj sur la monto Golgota neniu plu pendis, sed iu devis esti pendinta tie. – Ĉu li estis tiu, pri kiu vi parolas?“

„*Tiu li estis!* – Kaj li estas mia *frato*. – Kaj tiuj portantaj lin estis *miaj kaj liaj* fratoj.“

„Ho, kial oni ekzekutis lin? – Vi vere ne aspektas kiel frato de rabisto aŭ murdinto!“

„*Ĉar li malligis la homojn disde la morto, kaj ĉar tiuj eterne mortaj postulis venĝon!*“

„Tiuj vortoj estas al ni fremdaj kaj strangaj, sed vi parolas tiel, ke oni devas kredi al vi.

Sed kial okazis la *bruego*, kiun ni aŭdis?“

„Kaŭzis ĝin la gardantoj, kiujn ni estis enigintaj en magian dormon, por povi preni la teran korpon de nia frato, kiu mallonge kuŝis en tiu ĉi tombo sekve de la peto de riĉa amiko, kiun plenumis la potenculo de tiu ĉi urbo.

Ili devis gardi la tombon, kaj kiam mi vekis ilin, ŝaj-nigante ke mi hazarde pasas tie kaj ke mi ne scias kial ili dormas en tiu loko, ili ekbruligis siajn torĉojn, kaj trovis la tombon malfermigita kaj malplena.

Pro tio ilia sovaĝa malbenado!

Nun ili serĉas en la urbo tiujn, kiuj povus esti malfermintaj la tombon, kaj volas trovi la kadavron.

Sed mi restas ĉi tie, por konsoli la amikojn kaj disĉiplojn de la frato, kiam ili venos por lamenti antaŭ lia tombo.

Mi restas ĉi tie, por diri al ili, ke li vivas!“

„Sed ni ja vidis viajn fratojn forporti lian *kadavron!*“

„Tamen *vivas* li, por kiu tiu kadavro estis *vesto* kaj *vualo*, dum li bezonis veston kaj vualon por malkaŝi la spiriton al tiuj, kiuj vidas nur veston kaj vualon.“

„Se vi diras la veron, tiam diru ankaŭ al ni, kie tiu vivanto estas trovebla, ĉar vi parolas kiel pri iu, kiun oni deziras serĉi, eĉ se oni devus migri ĝis la limoj de la tero!“

„*En vi mem!*“

Kaj dum ni mire rigardis nin reciproke, ne sciante, kion tiuj vortoj signifas, la blanke vestita viro nerimarkate estis foririnta de ni, kaj kiam ni vokis lin, ni ricevis nenan respondon...

Nur en postaj tagoj lumo estis donata al ni, kaj ni *vidis* la vivanton kaj ni spirite ekkaptis lian altan instruon kaj ekde tiam li estis *en ni mem!*

Dum la blanke vestita viro parolis al la demandantoj, du el liaj fratoj atendis, en ne tro fora roka ravino

de la montaro, la aliajn kvar, kiuj alportis la kadavron de l' frato.

La atendantoj estis kolektintaj lignon kaj branĉojn kaj farintaj ŝtiparon, por kuŝigi sur ĝin la kadavron.

Nun ili vidis la portantojn proksimiĝi, kaj ili kuris renkonte al la laciĝintoj por helpi ilin porti.

Skuite – en senvorta kortuŝeco – la ses viroj levis la kadavron de la frato, kies tasko estis *finita*, sur la ŝtiparon kaj transdonis ĝin al la flamo ekbruligita per ŝtono...

De malproksime oni povis apenaŭ vidi malfortan strion da fumo, kiu iom post iom malaperis super la montaro, kiam la unuaj radioj de la matenruĝo kolorigis la montodorsojn.

Sed tiu vere *resurektinta* estis *volinta* ĉion ĉi, kaj liaj fratoj agis nur laŭ lia ordono.

La pasemaj restaĵoj de lia tera korpo ne devis malhelpi la *resurekton*, kiun li estis preparinta al si en la *animoj* de la siaj.

Sed *li mem* nun estis malligita de ĉio, kio ne estis *spirita* je li, kaj liberiĝinte li plu konsciis nur sian spiritan formon, ne plu sciante pri la torturado, kiun lia tera korpo estis spertinta.

Resurektinte en sia spirita formo, li estas, ekde tiuj tagoj, en altigita vivo en la spirita sfero de tiu ĉi tero,

estante resurekto por *ĉiuj*, kiuj en *agado* kaj *vivo* estas veraj disĉiploj de lia instruo. –

Tiel li vivas meze inter la siaj laŭ sia promeso: – „*ĝis la fino de la mondaĝo.*“

Unuiĝo

Atinginte la domon de la saĝuloj de la lumo, mi komencis frapi je la pordo, kiel iu plenrajte postulanta enlason, – sed neniu venis por malfermi.

Malĝojo falis sur mian animon, kaj laciĝinte mi endormiĝis antaŭ la sojlo.

Kiam mi vekiĝis post konfuzaj, timoplenaj songoj, viro staris antaŭ mi, kiu kondukis ŝargobeston ŝargitan per korboj el plektita kano, plenaj de freŝa pano.

„Kion vi volas ĉi tie, fremdulo?“ diris la viro.

„Ĉu vi ne scias, ke tiu ĉi pordo malfermiĝas al neniu, kiu ne antaŭe eliris el ĝi?“

Sed mi respondis:

„Ve al mi, se viaj paroloj estas veraj, ĉar mi venas de malproksime, kaj mia majstro igis min iri al tiuj loĝantaj en tiu ĉi domo, por ke mi povu esti akceptata en la rondon de ilia komuneco.“

La viro diris al mi:

„Ankaŭ mi apartenas al tiuj loĝantaj en tiu ĉi domo, kaj via deziro estas bone konata al mia spirito, – sed mi diras al vi: – *Neniu iam transpaŝis tiun sojlon, kiu ne antaŭe mortis!*

Kiam li post sia morto retrovas sin en tiu ĉi domo, li ekde tiam eniras kaj eliras senrestrikte.

Se vi do volas morti por veni al ni, tiu besto portu vin kiel mortinton trans la sojlon!“

„Kial mi ne volus morti“, mi respondis, – „se mi alie ne povas veni en vian komunicon?!

Mortigu min rapide, por ke mi transiĝu la sojlon, ĉar mi scias, ke transe de tiu pordo mia morto estos finita!

Ĉu ne ankaŭ vi mortis, antaŭ ol vi pasis tra tiu pordo, kaj tamen staras antaŭ mi vivanta?! –“

„Okazu al vi laŭ via volo“, respondis la viro, kaj tuj mi sentis, ke mia korpo fariĝis senviva, – ke mia scio pri mi mem estis kaptata de tremo de teruro...

Sed antaŭ ol mi ekkonis, ke mi estis tute forlasinta mian korpon, mi strange retrovis min kiel unu el la panoj en la korboj.

Mi volis voki, sed mi ne povis.

Estis same kiel, spertante grandan mizeron en sonĝo, oni volas voki kaj ne kapablas.

Mi volis fuĝi, sed la pano estis fariĝinta mia korpo kaj ne moviĝis.

Tiam mia konscio senfortiĝis, kaj tial oni devas esti portinta min en la domon kaj sur la tablon, kie mi iom poste retrovis min kuŝanta apud aliaj manĝaĵoj antaŭ la plado de la plej aĝa el la saĝuloj.

Ne longe mi tiel kuŝis – ankoraŭ kvazaŭ en peza obtuza sonĝo – kiam mi aŭdis la voĉon de la plej aĝa el la saĝuloj, kiu parolis:

„Benata kaj sanktigata estu tiu ĉi pano, kiu volas fariĝi nutraĵo al la eterna spirito!

Eterne ĝi estu, en la eterna regno, nutraĵo al la vualitata Dieco!“

Post tiuj vortoj li disduigis la panon, kiu estis mi mem, kaj mi sentis la disfendon iri tra mia korpo, kvazaŭ oni disdividus mian homan formon.

Mi tremegis pro doloro; neniigo nun ŝajnis certa al mi, kaj mi sopire deziris ĝin kiel liberigon, ĉar ne plu estis eble fuĝi for de la potenco, al kiu mi estis fordoninta min libervole.

En pli kaj pli da pecoj la plejaĝulo disdividis la panon, por doni pecon al ĉiu frato, kaj en ĉiu el la pecoj mi mem estis viva.

Mia scio pri mi mem vualiĝis denove...

Sed tiu vualiĝo ne daŭris longe, ĉar baldaŭ estiĝis ĉirkaŭ mi klareco, kiun mi ankoraŭ ne konis, kiom ajn hela antaŭe estis tiu lumado, en kiu la majstro instruis min vidi la aferojn de la tri mondoj, antaŭ ol li igis min migri sur la vojo al la domo de la saĝuloj.

Krome mi subite retrovis min en homa korpo kaj apenaŭ povis kompreni, ke mi ne plu estas panringo tia, kiajn mi vidis en la korboj portitaj de la ŝarĝo-besto antaŭ la pordo.

Kaj jen: mi parolis, – kaj tio, kion mi diris, estis paroloj de la plej aĝa el la saĝuloj...

Lia korpo estis fariĝinta la mia, kaj mia spirito estis neapartigebla de la lia.

Kiam la saĝuloj – liaj fratoj – rimarkis, kio estis okazinta, ilia parolanto, en kiu mi ekkonis la viron, kiu antaŭe trovis min antaŭ la pordo, diris:

„Jubilado estu en nia rondo, ĉar nova frato naskiĝis al ni, kaj vi, ho Plejaĝulo, kiu forĝas la eternan ĉenon de la lumantoj, – vi martele fermis la nefermitan ringon en ĉeneron!“

„Vi diras!

Tiuj viaj vortoj sciigas pri mia alveno.“

Tiel parolis *mi* el la buŝo de la plej aĝa el la saĝuloj.

„Kiel nutraĵo mi venis al vi por naskiĝi en via spirito.

Sed nun redonu al mi mian mantelon, por ke mi estu ĉe vi ne en la vesto de aliulo, dum la aliulo tenas sin kaŝita!“

Laŭ miaj paroloj la saĝuloj forlasis siajn lokojn ĉe la tabloj, kaj kondukate de la plejaĝulo, al kiu mia spirito estis unuigita, ili ĉiuj iris eksteren antaŭ la pordon.

Tie mia tera korpo kuŝis senviva kaj rigida, kvazaŭ morta.

Sed la plejaĝulo sin klinis super ĝin kaj parolis tre mallaŭte, kvazaŭ nur blove spirante al ĝi, tiujn ĉi vortojn:

„Vi estas mi!“

Servu al vi en mi kaj al mi en vi, nun el tiu via tera korpo!

Vi nun estas naskita kiel nutraĵo al la vivo de la lumo, kiu nutras ĉion!“

Kiam li estis parolinta tiujn vortojn, mi sentis, ke mia sentado eliris el la tera korpo de la plejaĝulo, dum mia spirito restis unuigita kun la lia.

Samtempe mi retrovis mian konscion en la korpo, en kiu mi estis veninta antaŭ la pordon, kaj tamen ĝi ne plu estis la tute sama korpo kiel antaŭe...

Io en ĝi estis transformita, kaj nun mi povis vidi, en la interno de mia korpo, la aferojn de la tri mondoj,

tiel same, kiel mi antaŭe kapablis vidi nur en la ekstero per la ekstera okulo.

Post kiam mi estis leviĝinta, la saĝuloj akceptis min kiel iun longe atenditan, en senlima ĝojo.

Kaj kiam ili kondukis tiun estiĝintan nova en la internon de la domo, la plejaĝulo, ebria de la Dieco, komencis kanti melodion, kies vortoj estis jenaj:

„Vivu por la amo, nutrante la lumon! – Iluminiĝinto, lumu al la mondo!“

Kaj la ĥoro de la saĝuloj, kiuj nun estis miaj fratoj, kantis en alterna kantado:

„Lernu enlume ekkoni vian lumadon! – Vivu por la amo kaj lumu al la mondo!“

Kaj en mia animo estis la spirita ekkonado de ĉiuj, kiuj ĉirkaŭis min.

Mi trovis ĉiun el ili *unuigita* kun mi, kaj estis fariĝinta konscia en ĉiu el ili, same kiel mi antaŭe estis konscia nur en mi mem ...

LA VOLO AL ĜOJO

*DIO VIVAS EN LA ĜOJO, –
NE EN LA SUFERO!
LA SKLAVOJ DE L' SUFERO KREIS AL SI
LA „SUFERANTAN“ DION!
VI SERVIGU AL VI VIAN SUFERON,
POR KE ĜI FARIĜU LA SERVISTO KAJ HELPANTO
DE VIA ĜOJO!*

Al ĉiuj strebantaj al la lumo

Ne demandu pri Dio!

Lasu *la demandon* pri Dio al sendiuloj kaj al idolservantoj!

Vi dubas pro bona kaŭzo, se vi dubas, ke Dio estas *neaŭdebla*.

Sed ni scias, ke Dio *respondos* al neniuj, kiu *dubante* demandas pri Li.

Ni scias, ke Dio evitas la bruegon de la demandantoj...

Sed kiu scias, ĉu li ne *aŭdus* Dion, se li *lernus* aŭdi la lingvon de Dio?! –

Necesa por tio estas kvieto.

Ĉio kreanta restas en la kvieto.

Pretigu al la kvieto lokon en vi, – por ke Dio povu fariĝi al vi amiko kaj samdomano!

Tiuj ĉi vortoj celas konduki vian animon al la granda kvieto.

Ni tie ĉi parolos al vi kelkan tempon *pri la homo*.

Ni devas deiri de la *homo* por atingi „Dion“, alie „Dio“ eterne restos por ni fremdulo.

Ni ne volas serĉi Dion *en la malĝojo de la koro*, ĉar kreis nin la Dia *volo al ĝojo!*–

Ni ne volas esplori Dion por vi per demandoj, ĉar eĉ en la plej delikata *demandado* jam bruegas la dubo ...

Ni instruas trovi Dion *en la kvieto*: – en la volo al *ĝojo!*

De tiuj, kiuj el la timo de sia koro bruege demandas pri la Dieco, ni konscie deturnas nin, ĉar alie ni ne povus veni kun vi en la kvieton.

Ni devas esti *solaj* kun la homo, kiun ni volas envenigi en la kvieton.

Homo, kiu volas lerni aŭdi *Dion*, devas antaŭe lerni aŭdi *sin mem...*

Li devas peni *respondi al si mem!*

Li devas fariĝi al si mem muta *demando*, kaj lia *respondo* tiam estos *sonna* ago.

Nur kun tiu homo aŭdanta sin mem ni *povas* veni en la grandan kvieton!

Kun li ni povas iri sur la vojoj, sur kiuj solaj Dio estas *aŭdebla*...

La instruo, kiun ni formas tie ĉi, povas celi nur tiun, kiu lernis aŭdi sin mem.

La instruo pri la volo al ĝojo

Ĉe la bordo de l' maro mi vidis patrinon sidantan kun sia infano.

La infano ludis en la sablo kun konkaĵoj kaj diverskoloraj ŝtonoj.

Sed ĝia tuta ludo konsistis en *elektado* kaj *forĵetado*.

Ĉu ni ne estas mem infanoj tiel ludantaj? –

Ni *elektas* kaj *forĵetas*, kaj tiel agadas dum jaroj kaj jardekoj, ĝis ni pretigas nin por la fino.

Ĉu ne pelas nin la sama impulso, kiu igis tiun infanon ludi kun konkaĵoj kaj ŝtonoj?

Tie ĉi ni restu kelkan tempon!

En tiu ĉi loko ni vidos la sunleviĝon.

Kial ni vojaĝu tra la nokto ĉirkaŭ la teron por postkuri la sunon?

Ni jam trovis la homon, kiu al si mem estas demando kaj al si mem respondo.

Elektado kaj forĵetado konsistigas lian agadon.

Vi neniam trovos la homon faranta ion alian.

Li indikos al vi grandajn motivojn, se vi demandas lin, *kial* li faras tion.

Sed neniam la homo tiom mensogas al si, ol kiam li mem volas elfosi *la kaŭzojn* de sia farado...

La impulsoj por la ludo de l' infano kaj por *ĉiu* agado fontas el la *sama* profundo.–

Ambaŭkaze troviĝas plej profunde la *volo al ĝojo*.

Por multaj enigmoj ĝi estas fina solvo.

Ĉiuj viaj pensoj kaj agoj estas viaj „konkaĵoj“ kaj „diverskoloraj ŝtonoj“.

Laŭ via *propra* valoro vi *elektos* kaj *forĵetos*. –

Baldaŭ vi ekkonos, ke *multaj* aferoj estas forĵetindaj, ĉar ili ne donas *daŭran* ĝojon.

Tamen vi amasigas multajn „diverskolorajn ŝtonojn“, kaj via okulo ĝojas pri ili kelkan tempon.

Sed tiam vi tediĝas de la ludo.

Vi lernas distingi *valorojn*.

Vi deziras trovi *gemojn* kaj fajnajn *perlojn*, – ne nur konkaĵojn kaj kolorajn ŝtonojn...

Komence vi perdas la esperon.

Vi vidas vian unuan ĝojon morti sekve de via *ekkonno*. –

Via malgaja rigardo vagas sur la sablo.

Sed jen: – tie inter la ŝtonetoj io *lumas!*

Vi tuj ĵetas flanken viajn kolorajn ŝtonojn por ekpreni tion lumantan.

Vi trovas vian unuan *gemon!*

En tiu tago vi fariĝis saĝa!

Vi ne plu ĝojos pri ŝtonetoj brilantaj nur tiom longe, dum la maro lavas ilin.

Ekde hodiaŭ vi forĵetos multon el tio, kio ŝajnas ĉarma al via okulo, kaj vi serĉos tion malmultan, *kio lumas konstante*.

Tion postulas la volo al ĝojo:

Ĝojo sen elreviĝo,

ĝojo sen interrompo,

ĝojo sen fino!

Certe vi nun demandas:

„Se tiu ĉi instruo entenas la veron, de kie do venas – la sufero? –“

Kaj mi respondas al vi:

Sufero estas la kondiĉo kaj garantio de la ĝojo!

Ĉio en la kosmo vivas el polusaj kontraŭoj.

Granda kaj malgranda, alta kaj malalta, ĝojo kaj sufero, vero kaj mensogo, forto kaj malforto, – el tio vivas ĉio vivanta!

Sen la *sufero* la *ĝojo* ne povus ekkonscii *pri si mem*, ĉar apartigado kaj dividado ĉiam kreas *suferon*; – sed apartigado kaj dividado estas *necesa*, por ke la *ĝojo* povu manifestiĝi en ĉiuj formoj, kiujn bezonas ĝia infinitoble diversa agado, el kiu ĉio vivanta sin konservas.

Sed *via volo* al *ĝojo* instruos al vi vidi en la *sufero* la *mensogon* kaj tiel *senvalorigos* al vi la *suferon*.

Sufero kaj *ĝojo* bezonas sin reciproke, sed sufero kaj *ĝojo* ankaŭ kontraŭbatalas sin reciproke, sen atingi pacon.

Sufero kaj *ĝojo* volas tiri al si viajn fortojn.

Sufero kaj *ĝojo* volas, ke vi *juĝu ilian valoron*.

Kiom da valoro vi *atribuas* al la *ĝojo*, tiom da valoro vi *forprenas* de la sufero, – ĝis iam ĝi fariĝas obema *servanto* de via *ĝojo*! –

Mi certe ne konsilas al vi senkuraĝe fuĝi for de ĉio maloportuna kaj malagrabla.

La volo al *ĝojo* ofte volas gvidi la homon tra mal-lumaj ravinoj de la sorto al helaj altaĵoj...

Ĉiu venko necesigas batalon.

Batali signifas: *sufери* vundojn kaj *kaŭzi* vundojn!

Sufero venos *al vi* fare de *aliaj*, kaj *vi* estos kaŭzo por la sufero de *aliuloj*.

Sed gardu vin en via volo al *ĝojo*, ke *vi* ne *ĝoju* ankaŭ pri la *vundoj*, kiujn *vi* batalante devas kaŭzi!

Vi metu vian suferon en katenojn, se *ĝi* igas vin suferi senutile.

Sed kie via sufero *elvokas al batalo*, tie *vi* *batale akiru* la venkon!

Ĉiu sufero estas *mensogo!*

Ĉiu sufero iam pereos en la *vero!*

La sufero ne estas io restonta.

Nur la *ĝojo* estas *eterna*, ĉar *ĝi* *originas* el la eterno.

Ĉiu sufero estas via *kontraŭulo* kaj *oponanto*.

Ĉiun suferon *vi* devas ligi, farante *ĝin* via *servanto*, por ke la *ĝojo* estu libera kaj regu!

Sed *vi* ne *malamu* vian suferon!

Malamo estas la koloro de la *senpoveco*.

Sed la volo al *ĝojo* instruos al *vi* la *amon de la venkinto!*

Per la volo al *ĝojo* ĉio fariĝas facila al *vi*.

La plej efika potenco de la vivo staras ĉe via flanko.

Eĉ iu, kiu plimultigas la *suferon*, kaŝe strebas al *ĝojo...*

Lia volo al *ĝojo* estas *katenita*, sed *ĝi* tamen restas fonto de forto.

La volo al ĝojo generas *ĉiun* agadon.

La volo al ĝojo konservas ĉiun vivon.

Vi mem elektu, ĉu vi volas, kiel trompita batalanto, *servi* al la sufero, – aŭ, venkante, *subigi* ĝin!

Vi povas malvenki nur tiuokaze, se vi montras *timon* antaŭ la sufero.

Sed la volo al ĝojo volas fari vin *sentima venkanto!*

Vi povas trovi la agadon de la volo al ĝojo en ĉio ekzistanta.

Formon kaj *mezuron* volas la volo al ĝojo, por ke la ĝojo povu *naskiĝi* el la *amo*.

Amo estas strebado al *unuigo* de ĉio *apartigita*.

Sole amo devigas la malamon al servado.

Amo *unuigas* ĉiujn *interkontraŭojn*.

La volo al ĝojo povas *generi* la ĝojon sole el la *amo*.

La volo al ĝojo estas *vira* volo, – ĝi bezonas la *naskantinton*: la *amon*.

Sen *amo* la volo al ĝojo estus kvazaŭ senripoze *vaganta* *damnito*...

Amo donas al ĝi *celon* kaj *difinitan direkton*.

Amo faras *ekvilibrigon* inter kontraŭaj *polusoj*.

Amo *enordigas* ĉion *malgrandan* en tion *grandan*.

Amo *unuigas valoron* kaj *malvaloron* laŭ *eternaj leĝoj* en *ampleksa unueco*.

Ĝi ŝatas ĉiun malvaloron pro la valoro, al kiu tiu malvaloro devas servi, – ĉar ne ekzistas *izolitaj* valoroj kaj malvaloroj en la regiono de la realo.

Kvankam valoro kaj malvaloro okupas malsamajn rangojn, ili ĉiam reciproke sin *kondiĉas*.

Ĉio, kio volas *kreski*, devas strebi al *unuigado* de valoro kaj malvaloro.

Ĉio viva bezonas *unuigon* de malsamaj partoj en *amo*.

Nur tiel ekkreskas io restonta.

Vi vidas la homojn morti kaj vi demandas:

„Kie do tie ĉi estas *tio restonta*?! –“

Prefere demandu:

„Kie tie ĉi estas *tio pasema*?! –“

Mi vidis plej amatajn homojn morti, kaj mi povis trovi *nenion* paseman.

Rigardu tion, kio postrestis de ĉiuj, kiuj vivis sur tiu ĉi tero, kaj vi ekkonos *nur novan unuigon de la partoj*, kien ajn rigardos via ekstera okulo!

Kiu volas montri al vi *ion paseman* tie, kien via korpa okulo rigardi *ne* povas??

Tien, kien ĝi *ne kapablas* rigardi, ĝi ankaŭ tiam ne rigardis, kiam la homoj nun forigitaj de vi estis ankoraŭ *percepteblaj* per viaj sensoj.

Tiutempe viaj sensoj montris al vi nur, ke tie ekzistas io difinita, pri kiu sciigis vin nur ties *efiko* sur viajn sensojn.

Se vi nun kredas, ke estas *neniigita* tio, pri kies ekzisto vi *sciis*, dum ĝi ankoraŭ povis efiki *sur viajn sensojn*, – tiam vi vere estas nur „*sklavo*“ de viaj sensoj! –

Ankaŭ la *funebro pro ies morto* originas nur el la volo al ĝojo, kiu trovas sin nepovanta revenigi tion, kion ĝi perdis kiel *kaŭzon* por ĝojo.

Tiu funebro trompas vin, se ĝi volas rabi de vi la fidon pri la ekzistado de tiuj, kiujn via korpa okulo ne plu povas vidi, ĉar ĝi taŭgas por vidi nur *ion fiziksen- se percepteblan*.

Pri vi mem vi funebru, ĉar vi subfalis al *trompo*!

Nur tion, kio impresis la sensojn de via korpo, vi rigardis kiel ion ekzistantan...

Nun vi devas ekkoni, ke la pasema ĝojo pri *tio fizik- sense perceptebla* je la homo estas io tute alia ol la *daŭra ĝojo pri la homo mem*.

Nun vi devas lerni ekkoni, ke „videbleco“ estas nur tempa atestaĵo de *nevidebla realo*.

La *tuta realo* baziĝas sur realo *nevidebla*!

Se vi volas trovi la *realon* de la *homo*, vi povos atingi ĝin nur *en la realo nevidebla*, pere de tio *nevidebla en vi!* –

Vi povas kredi *multon* al tio videbla, sed devas kredi *ne ĉion* al ĝi!

Vi devas lerni ekkoni tion videblan kiel kontraŭpoluson de tio nevidebla en vi.

Ni ne povus sperti nin mem en tiu ĉi vivo, *sen* la volo al fiziksensa videbleco, kiu strebas eksteren.

Volo nevideble *estiganta* kaj volo videble *estigata* estas tempe unuigitaj en ni.

Ni ankoraŭ ne proksimiĝas al la spiritleĝa kondiĉo por *daŭra* unuigo de ambaŭ volopolusoj.

Malligo de tio tro multa, aldono de tio tro malmulta: – vere nenio alia estas la „morto“, kiu malligas tion nian nevideblan disde tio videbla.

Ne plu *malhelpataj* de videblaj formoj, ni tamen vivos kaj agos ankaŭ en la videbla mondo, ĉiu unuopa *kiel tuto*, nun konsciante sin mem el la kosma, eterna tuto...

Pro tio, ke ilia „*ekstero*“ fariĝis „*interno*“, kaj via „*interno*“ ankoraŭ *luktas* kun via „*ekstero*“, – tial vi ne povas trovi vojon al tiuj nomataj de vi „*la mortintoj*“. –

Fakte *ekzistas* vojo al ili, sed ĉiutempe vivas nur malmultaj homoj sur la tero, kiuj kapablas sendanĝere ekiri sur tiun vojon.

Ĝi komencas en la ekstero kaj kondukas tra la plej internaj haloj de la naturo antaŭ ol atingi sian celon.

La homo, kiu volas ekiri sur ĝin, devas *mem lumigi* tiun vojon, alie la migranto perdas la vojon en la labirintoj tramigrendaj.

Nokto kaj konfuziĝo ĉirkaŭas lin tie, ĝis li mem pereas en nokto kaj konfuziĝo.

Fine frenezo kaptas lin.

Ĉiuj *kapablaj* ekiri sur tiun vojon *sendangere*, *evitas* ĝin.

Ĉiu el ili povas atesti la verecon de miaj vortoj.

Vi povas ekkoni apenaŭ *vin mem* en via „interno“, – kiel vi povus esperi percepti tie la delikatajn voĉojn de la mortintoj?!

Sed estas tute senutile serĉi eble en la „ekstero“ *pruvon* de io, kio estas trovebla nur en la plej interna „interno“.

Eterna vivo estas ripozo kaj agado.

Ripozo kaj agado eterne alternantaj kiel alta tajdo kaj malalta tajdo, en la eterna maro de plej interna okazado.

Eterna ripozo estus vera morto!

Eterna agado estus vera damniteco!

Ripozo kaj agado unuigitaj en ĝojo estas *beata vivo!*

Vi interpretas vian sopiron erare, se vi kredas sopiri al „eterna ripozo“.

Via sopiro volas *eternan ĝojon* en ripozo kaj agado!

Ĝojo estas homa sentado de Dia perfekteco!

Tial vi donu al la volo al ĝojo potencon en vi!

Vi *ne* povas *tro multe* strebi al ĝojo!

Kaj la mezuro da daŭra ĝojo, kiu estas *donata* al vi *nun*, *neniam* plu povas esti *forprenata* de vi...

Ĉie la naturo starigas siajn vojindikilojn.

La homoj petole kuras preter ilin, kvazaŭ dancantaj infanoj...

Vi prefere lernu *atenti* la vojindikilojn! –

Vi ankoraŭ strebas al *volupto* kaj lasas vin konsumi de *avidoj*, sed nur la *ĝojo* kondukas en la daŭrontan vivon...

Dio estas en la *ĝojo*!

Ĝojo estas *klara lumo*!

Volupto kaj *avidoj* estas *bruletanta fajro*!

La volo al ĝojo estas *volo al Dio*!

Ekkonu vin mem: –

Vi estis *dormanta volo*, *antaŭ* ol unu poluso en vi urĝe strebis al la *videbla* mondo.

Songanta volo vi estas ankoraŭ nun!

Sed pli kaj pli vi fariĝos volo *konscia*, ĝis iam, en ĝojo kaj klareco, vi vive *penetros per via volo* ĉion en vi.

Ĉiuj leĝotabuloj estis starigataj de la volo al ĝojo.

Vi mem estas volo al ĝojo kaj sole sekvas vian propran leĝon, se vi en ĝojo volas veni al vi mem kaj en ĝojo al Dio!

Ĉio, kio rezultigas *restontan ĝojon*, servos al vi.

Ĉio, kio ne servas al *restonta ĝojo*, devas malutili al vi.

Vi mem estas via juĝanto, kaj via verdikto estas via *ago!*

Vi povas „damni“ vin mem por longa tempo, kaj vi povas levi vin per via agado al la plej alta „beateco“ ...

Sed kiom ajn *longe* vi eble eraras, – vi *devas* fine, eble eĉ post eonoj, sekvi *vin mem!*

Tuj kiam vi *ekkonas* vin mem, vi trovos vin en la lumo de la Dieco.

Vi ankoraŭ strebas eksteren al malplena, rigida nenio.

Vi ankoraŭ explore rigardas al mil celoj ie „ekstere“.

Sed iam vi ekscios, ke nur *vi mem* fariĝu via celo, *en la volo al la ĝojo pri vi mem.*

Vi tenas en via mano la potencon *ligi* vin kaj *malligi* vin!

Vi ankoraŭ ne konscias vian potencon.

Vi atendas „ekstere“ tion, kio okazas nur *plej interne.*

Sed „ekstero“ kaj „interno“ fariĝos *unu* al vi, kiam vi *ekkonas vin mem* en la volo al ĝojo!

Longe oni instruis al vi, ke „malĝojo de la koro“ kaj „kontricio“ povas proksimigi vin al Dio.

Vi konfidis al tiu instruo, kaj nun vi *timas* iri sur la vojo al vi mem kaj al via Dio.

Sed timu nenion krom tio, kio volas igi vin timi!

Vi paŝados sentime en la *forto* de la ĝojo, tuj kiam vi *volas vin mem* en la volo al ĝojo.

En la volo al ĝojo vi spertos eternan vivon!

En la volo al ĝojo sin revelacias al vi via vivanta Dio!

En la volo al ĝojo Dio iam unuigos sin al vi por eterne!

Tiam vi ekkonos, ke estis nur mallumaj *idoloj* tiuj, kiuj provis teni vin for de *la ĝojo pri vi mem*, kiu estas la prafonto de via *volo* al ĝojo!

Tiam vi ekkonos, ke tio, kio ne lasis vin *veni* al via ĝojo, estis timo!

Tiam vi ekscios, ke via esto estas *sekura* nur, kiam vi *povas ĝoji pri vi mem!*

Por eterne donacita al vi *mem* en sankta ĝojo, vi por eterne estos en la *volo al ĝojo!*

Epilogo

Kion la tre malmultaj el miaj spiritaj fratoj,
Kiuĵ, pro sange heredita pensado,
Sin sentas devoligitaj observi *praan formon*,
Eĉ hodiaŭ tenas tiom *kaŝita*,
Ke ili donas limigitan enrigardon
Nur al severe kaj multoble instruitaj disĉiploj
Post longa provado, –
Tion mi povas malkaŝi al *ĉiuj* homoj,
Kiuĵ spirite kaptas miajn vortojn.

Ĉiuj objĉetoj estis refutataj,
Kiuĵ celis haltigi tiun ĉi diskonigon –
Ĉar eĉ evidentaĵo restas vualita
Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne povas vidi.

Sed mi konscie evitis Okcidentan kutimon:
Nomi „realo“ nur *tion*,
Kion la *cerbo* kiel tian rigardas.

Ĉar mi estas enmetita en *eternan* ordon
Kaj observas leĝojn *supertempajn*.

Fino

Esperanto-tradukoj de aliaj libroj
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj ĉe jena adreso:
<http://www.a-rehfeldt.de>